


BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA

Esperanto

KUL

1368 I

EP 1198



MAZEPA

ALIAJ VERKOJ DE L' SAMA AŬTORO

Kondukanto de l'interparolado kaj korespondado kun Antologio internacia (Hachette et C ^{ie})	Fr. 2 »
Mazepa , trad. el J. SLOWACKI (Hachette et C ^{ie})	— 2 »
Halka , trad. el W. WOLSKI (Hachette et C ^{ie})	— 1 »
La juĝo de Oziris , trad. el H. SIENKIEWICZ (Jan Günther)	Sm. 0,25
Kio okazis foje en Sidono , trad. el H. SIENKIEWICZ (Jan Günther)	— 0,25
Consilium facultatis , trad. el J. FREDRO (Jan Günther)	— 0,40
Nova Antologio (poezia) (Jan Günther)	— 0,25
La Tagiĝo (Jan Günther)	— 0,10
Libroj de Profetoj (poemoj) el A. LANGE (Jan Günther)	— 0,10
Granda Vortaro Pola-Esperanta (M. Arct)	— 1,60
Malgranda Vortaro Pola-Esperanta (M. Arct)	— 0,90
La Liro de Esperantistoj (M. Arct)	— 0,60



JULJUSZ SŁOWACKI

16033880
286

MAZEPA

Tragedio en kvin aktoj

EL LA LINGVO POLA TRADUKIS

ANTONI GRABOWSKI

4109230

126
ref 149
+

PARIS

LIBRAIRIE HACHETTE ET C^{ie}

79, BOULEVARD SAINT-GERMAIN, 79

1912

Tous droits réservés.

87 1102

PERSONOJ

REĜO JAN KAZIMIR.

MAZEPA, kortegano de la reĝo.

VOJEVODO.

AMELJA, edzino de la Vojevodo.

ZBIGNJEV, filo de la Vojevodo el unua edziĝo.

ĤMARA

PASEK } korteganoj de la Vojevodo.

ĤSONSTKA }

KASTELANINO.

Reĝaj ĉambristoj, nobelaro, homoj de la Vojevodo, Pastro, k. t. p.

Scenejo en la kastelo de la Vojevodo.

Esper 1367 I



Biblioteka Uniwersytecka KUL



1001144563

ANTAŬPAROLO

Juljusz Slowacki (Juljuŝ Slovacki), unu el plej grandaj poetoj de Polujo¹, naskiĝis en la jaro 1809 en Krzemieniec (Kŝemjenjec, Volinio). Lia patro, kiu lin ortigis tre frue, estis tie profesoro de liceo, kaj poste, de 1809 ĝis la morto en 1814, profesoro ĉe la Vilna universitato, — lia patrino estis virino neordinare klera, simpatia kaj posedanta altflugan, poezian imagecon, kiun Juljusz heredis de sia naskintino.

Fininte en Vilno la gimnaziön kaj la juristan fakultaton de la tiea pola universitato, Slowacki ekloĝis en la jaro 1828 en Varsovio kiel ministeria oficisto, sed jam en la jaro 1831, post la eksplodo de la pola revolucio, li forveturis eksterlanden, kie li pasigis la tutan reston de sia malgaja, malfacila, dornoplena vivo.

En diplomatiaj aferoj li haltis en Drezdeno, Parizo kaj Londono, gastis preskaŭ kvar jarojn en Genevo (1832-36), ĝuante la belecojn de la svisa naturó, vojaĝis poste tra Italujo, Grekujo, Egiptujo kaj Palestino, kaj loĝis dum la lastaj dek jaroj de sia vivo en Parizo, kie li mortis en la jaro 1849, ne revidinte jam la varmege amatan patrujon. — Li ripozas sur la pariza tombejo Montmartre, kie lia patrino starigis modestan monumenton, disfalantan hodiaŭ en rubojn.

La poezia genio vekiĝis en Slowacki tre frue, ankoraŭ kiam li

1. La tri poeziaj geniuloj : Mickiewicz, Slowacki kaj Krasinski, kompletigante sin reciproke, esprimas plene la spiriton de la pola poezio, dum ĝia plej alta disvolviĝo, en la zenita romantika epoko inter la jaroj 1830 kaj 1848.

estis deksesjara junulo, sed la unuaj volumetoj de liaj verkoj aperis en Parizo nur en la jaroj 1832-3. En ili troviĝis ses poeziaj rakontoj (Hugo, Ŝmija, Bielecki, Monaĥo kaj Lambro) kaj du dramoj (Mindowe kaj Maria Stuart).

En la junecaj poemoj de Slowacki, skribitaj jam per mirinde bela lingvo, kun granda virtuozece de l' verso, kaj brilantaj per altfluga poezia fantazio, estas sentebla la influo de la potenca genio de Byron, kiu impresis la senteman animon de la juna poeto, kiel poste sorĉis lin Shakespeare kaj Calderon. Sed tio ne signifas, ke li estis nur ilia talenta imitanto, ĉar ĉio, kion verkis Slowacki, portas la originalan stampon de lia propra genio. « Eĉ semo el fremda trezorejo prenita elkreskas sub lia spiro ĉiam en floron novan, grandiozan, antaŭe neviditan. »

El tiuj junecaj kreaĵoj plej matura estas la tragedio. « Maria Stuart », kiu ĝis hodiaŭ konservis sian scenejan valoron. Oni povas diri, ke la titola heroino estas eĉ pli tragedia, ol la pasiva, senkulpe pereanta « reĝino-sklavino » de la granda Schiller.

La unua verko, kiu impresis pli profunde la samlandanojn de la poeto, kaj precipe la polan junularon, estis la nacia dramo « Kordjan » (1834), kiun sekvas ĉefverkoj jam liberaj de la influo de la brita majstro. Ilin verkis Slowacki dum sia restado en Svisujo, sed pro manko de monrimedoj eldonis unue nur inter la jaroj 1839-40.

Al ili apartenas la grandiozaj dramoj: « Mazepa », « Balladyna », « Lilla Weneda » kaj la fantazia alegoria poemo « Anhelli », verkita per sublimesa stilo biblia kaj prezentanta la suferojn de la pola nacio; fine la belega, el ĉielarkaj koloroj kaj sunradioj teksita poemo « En Svisujo », kiu estas poezia konfeso, rekreaanta realaĵon, de l' poeto travivitan, sed refanditan en perlon de poezio¹.

En Genevo la poeto ekkonis la polan familion Wodzinski, en kies societo li faris ekskursojn, dum kiuj, meze de ĉarmaj naturbildoj, inter li kaj fraŭlino Marja W. komenciĝis ama idilio,

1. « En Svisujo » aperis esperante en « Lingvo Internacia » poste en « Konkundakanto-Antologio » (Hachette).

interrompita, kiam gesinjoroj W. kun sia filino subite forlasis Svisujon. — En la poemo la potenca fantazio de l' poeto prezentas en belegaj bildoj unue, kion li vidis kaj sentis per sia imageco dum tiuj feliĉegaj horoj, kaj kiel « Post ŝia forflugo, post sonĝo la ora » funebre plendis lia dolorŝirata animo.

Siajn impresojn el la orientlanda vojaĝo Slowacki enkorpiĝis interalie en la granda poemo : « Vojaĝo orienten », en la himno « Mi malĝojas, Sinjoro »¹, kiu estas vera perlo de la pola liriko, kaj en la korskuanta rakonto « Patro de pestuloj »². Plue li verkas la dramojn : « Beatrix Cenci », « Ora Kranio » kaj aliajn post lia morto eldonitajn. Dum la vivo de l' poeto aperas en la jaro 1841 la poemo « Bieniowski », oktavrma satira verko, enhavanta altpoeziajn scenojn kaj pentraĵojn, kaj vipanta la kontraŭulojn per sprito kaj ironio.

En la lasta periodo de sia poezia kreado Slowacki fariĝis mistikulo, kion pruvas ankaŭ lia oktavrma, granda historiozofia rapsodo « Reĝo-Spirito », kies unuan parton li eldonis en la jaro 1847.

La dramon « Mazepa » Slowacki verkis unue en la jaro 1834 dum sia restado en Svisujo, sed forbruliginte la unuan manuskripton, li post kelke da jaroj kreis ĝin denove kaj eldonis unue en la jaro 1840.

La titola heroo estas figuro tre populara en la eŭropa literaturo (ĉe Byron, Puŝkin, Viktor Hugo kaj aliaj). Ĉe Slowacki Mazepa aperas ne kiel grava historia persono, hetmano de Ukraino, sed ankoraŭ kiel facilanima reĝa paĝio, kiun (laŭ Memorajoj de la pola kronikisto Pasek), la ĵaluza pro sia edzino grandsinjoro punis per maniero originala kaj terura³.

Apud la perversa virin-delogisto, kiu malkovras fine koron sinceran, bonan, kavaliran, kompateman por fremda malfeliĉo, kaj kiu, riskante la propran vivon, venĝas la malhonorigitajn

1. « Mi malĝojas, Sinjoro » aperis esperante en « Nova Antologio » (eldono de « Pola Esperantisto »).

2. « Patro de pestuloj » estis presita esperante en « Lingvo Internacia ».

3. La historiajn datojn vidu en « Klarigoj » ĉe la fino de tiu ĉi libro.

mortintojn, ni trovas en la dramo de Slowacki du aliajn belajn karakterojn : de la juna vojevodedzino Amelia kaj de ŝia duonfilo Zbigniew. Krom tio la dramo prezentas du poeziplenajn rilatojn : de senespera, fatala amo inter Amelia kaj Zbigniew, kaj de amikeco, liganta la konsumatan de interna ardo, ŝajne indifrentan, sed eksplodeman vojevodidon kun la ventkapa, sed jam pli vivosperta, kavalira kozakofilo.

Kiam en la trankvilan grandsinjoran hejmon de la Vojevodo venas gaste kun sia sekvantaro la reĝo Jan Kazimir, — prezentita de l' poeto, kiel cinika, voluptema, malica hipokritulo¹, — tiam la fiero Vojevodo akceptas lin grandioze kaj estas por sia reĝa gasto la plej humila serviŝto ; sed kiam la vojevodo ekvidas, ke la gastoj atakas lian edzan honoron, tiam li ribelas, fariĝas laŭ tiutempaj moroj terura « kuracisto de sia honoro », furiozas, kaj, blindigite de kolerego, ardante per venĝemo, li, kiel la antikva senkompata fatalo, frakasas kruele la vivon de siaj senkulpe suferantaj viktimoj, por fine mem faliĝi sur la rubojn de sia hejmo.

Kvankam la poeto, sekvante sian poezian inspiron, ne atentis diversajn formulojn por laŭregule konstruota klasika dramo, kaj tial « Mazepa » estis multe kritikata, tamen tiu ĉi tragedio kiel tutaj prezentas vere grandiozan konstruon. Ĝiaj belegaj scenoj jen brilas per sprito, jen kortuŝas per lirikeco, jen rigidas la sangon per teruro. La scenejo, komence serena kiel printempa suna mateno, kovriĝas fine per nigra nubego plena de frakasantaj fulmobatoj.

Sed tiuj belecoj de la verko brilas tute kaj plene nur dum la teatra prezentado ; ĉar « Mazepa » respondas al ĉiuj postuloj de la sceneja arto :

La dramo posedas riĉan, komplikitan, subite turniĝantan intrigon, altgrade dramatan dialogon, kaj eksterordinare vivoplenan, kiel montara torento nehaltigite antaŭenfluantan agadon, sur kies fono reliefe desegniĝas la agantaj personoj. — Dank' al tiuj ĉi ecoj la tragedio « Mazepa » estas sur la polaj scenejoj unu el plej valoraj ornamoj de la klasika repertuaro.

1. Komparu la klarigojn.

Ĉar la genio de Slowacki levis la poeton sur altaĵojn, kie ne nur la hejmlando, sed la tutmondo devus lin vidi, kompreni kaj admiri, Esperanto estu do la bona feino, kiu forigos la vualon, kovrantan lian vizagon antaŭ la tutmonda diverslingva rigardantaro.

LA TRADUKINTO.

RIMARKO. — La traduko de « Mazepa » estas verkita, kiel la originalo, per verso aleksandrina 13 silaba, kun cezuro post la sepa neakcentita silabo. Ĝia ritmo estas analizita aliloke pli vaste (Nova Antologio). Oni ricevas senpere la ĝustan ritmon, akcentante la vortojn same kiel en prozo.

MAZEPA

AKTO UNUA

SCENO I

Salono lumigita kiel por balo.

VOJEVODO, ZBIGNJEV, poste la KASTELANINO.

VOJEVODO.

Ĉe la kanonoj tenu meĉojn bruligitajn!
Vi filo, moŝto Zbignjev, rigardu atente,
Ĉu ĉio estas preta por reĝaj festenoj.

(Al la eniranta Kastelanino.)

Moŝto kastelanina! mi havas motivojn
Ĝoji, ke vin mi vidas en sano, freŝeco. —

KASTELANINO.

Kastel' de via moŝto aspektas tre bele! —
Lampoj! lustroj! oraĵoj! — Kaj via edzino?

VOJEVODO.

Ĝis nun ne estas preta kaj ne ornamita —
Mia fil' anstataŭos ŝin ĉe via moŝto.

Mi iros nun rigardi el turo sur stratojn,
 Ĉu jam sur voj' tilia ne veturas reĝo.
 Zbignjev, vi atentigu al Kastelanino,
 Amuzu ekscelencon!

KASTELANINO.

Vi venas el Padva?

ZBIGNJEV.

Ne, estrino, jam el la armeo.

KASTELANINO.

Ĉu vere?

Vi en armeo?

ZBIGNJEV.

Rota majstro jam kirasa.

KASTELANINO.

Gardu vin, ĉar fariĝos vi tuj malfidela
 Kiel ĉiuj rotmajstroj, — delogist' petola.

ZBIGNJEV.

Dio gardu!

KASTELANINO.

Okuloj viaj brilas akre,
 Sed iel afekcie, kvazaŭ sub nebulo —
 Kio estas? — kirason vian mi ekbatos
 Per ventumil', kaj ĉion malkaŝos la koro.
 Pri Italujo al mi parolu!

(Oni aŭdas bruegon malantaŭ la scenejo.)

VOJEVODO.

Ĥoleva!

Sinjor' Ĥoleva! kia kri'? Sinjor' Ĥoleva!
 Moŝto Ĥŝonstka! ĉu ĉiujn forprenis diabloj?
 Jen fratec'! sabroj sonas, ni iru pacigi.

(Li eliras.)

SCENO II

ZBIGNJEV, KASTELANINO, S^{ro} HŜONSTKA, kiu eniras tra alia pordo.

HŜONSTKA.

Kie la vojevodo?

KASTELANINO.

Volu nin informi

Kia krio?

HŜONSTKA.

Okazo, jen, estrina moŝto,
Tre malgaja.

KASTELANINO.

Do diru!

HŜONSTKA.

Kaleŝ' post kaleŝo
Enveturis sur korton, moŝto sinjorina;
El kaleŝoj eliris nobeloj, sinjoroj.
Unujn gvidis sinjoro landmarŝalo Ŝĉara,
Ribelulo kuraĝa, an' de Lubomirski;
Marŝalo Olgopolski kondukis aliajn,
Reĝina partiano, virinul' nomata.
Antaŭ kastelpordego sin renkontis ambaŭ
Tiuj marŝaloj, ĉiu kiel la patrono
Kaj *amicus* de sia *cauda* geamika.

KASTELANINO.

Mi petas, latinaĵon vian lasu flanke.

HŜONSTKA.

Estis inter la ambaŭ marŝaloj demando :
Kiu faros unuan paŝon en vestiblon;
Tamen ambaŭ ĝentilaj, kaj, por ne ofendi,
Unu kaj la alia, depreninte ĉapojn,
Komencis riverenci, saluti, fleksiĝi.

Vane senharaj kapoj frostiĝis ĉe luno;
 Unus kriis : Ne inda mi! — dua : Ne inda!
 Certe eterne daŭrus tiuj ĉi respektoj,
 Se iu, rigardante tiun ĝentilecon,
 Laŭŝajnan, jezuitan, ne ekkrius laŭte :
 « Iru, sinjoro Ŝĉara, kaj kovru la kapon! »
 Olgopolski, aŭdinte, falas kiel fulmo
 En pordegon. — Vidinte tion, ankaŭ paŝon
Accelerans sinjoro Ŝĉara faras same.
 Kio plu? — Kiam ili kune koridoron
 Eniris, kunŝtopiĝis per ventroj kaj nazoj;
 Nobelaro, per puŝoj, voko, ilin vane
 Instigas kaj invitas en sekvantajn ĉambrojn —
 Ne eble — tial oni volis en duonon
Secare inimicos, eksonoris sabroj —
 Kiel do en malvasta haven' du ŝipegoj,
 Kiuĵ *fortunam* portas antaŭ fulmotondro...

VOJEVODO (malantaŭ la scenejo).

Disrompi muron, moŝtoj iru tra la breĉo!
 Sinjor' Ĥmara! disrompi muron!

KASTELANINO.

Kia farso!
 (Ĥsonstka eliras.)

SCENO III

ZBIGNJEV, KASTELANINO, eniras AMELJA.

KASTELANINO.

Jen kia knabineto? Papili'-flugilaj
 La ŝuetoj; sur kapo nenia buklaĵo.

ZBIGNJEV.

Mia duonpatrino, sinjorina moŝto!

KASTELANINO.

Tiel juna? Ankoraŭ infano.

(al Amelja.)

Mi petas,

Bela infano, estu mia amikino!

Rigardu min la via. — Bone? — Kiel bela

Ŝi estas, sinjor' Zbignjev! — Najbarin' neniu

Egaliĝas. — Ne hontu, diras mi, maljuna.

Pro kio vi ne kaptis printempajn muŝetojn

Kaj per la flugiletoj ne pentris vizaĝon?

En la haroj, vi fiksitis tro blankan rozeton,

Tro blankan. — Jen ankoraŭ ideto senkulpa!

Sinjor' Zbignjev, ĉu havas vi devan respekton

Por la juna patrino? kiel vi kondutas?

Strange, vi ŝajnas esti malvarma ŝtonego...

Atentiĝu do al la juna bel-patrino.

(al Amelja.)

Vi estas kiel blanka kolombo en kaĝo;

La kastel' — tre malgaja; vi bezonas sunon!

Jes? — sed vin enuigas mia babilado?

Mi rakontos do ion agrablan : kun reĝo

Venis Mazepa.

AMELJA.

Kiu?

KASTELANINO.

Kion? malfeliĉa!

Do vi neniam aŭdis pri sinjor' Mazepa?

AMELJA.

Ne, sinjorino!

KASTELANINO.

Mi vin tuj blindige ramos

Parolante pri tiu ĉarma ventkapulo,

Kaj eble vian puran koreton flamigos

Fajro neestingebla! — Vi lin baldaŭ vidos.

Lia kor' malfermita estas kiel pordo :

Unu ŝi elveturas, alia alvenas...
 Liaj rigardoj, kiel forĝista martelo,
 Senĉese la koretojn batas, frapas, rompas
 En pecetojn. — Avertu por vi, sinjorino!
 (La kanonoj tondras.)

AMELJA.

Ho Dio! reĝo...

KASTELANINO.

Tiel baldaŭ li ne venos.

Antaŭ vestiblo staris, kun gravec' papaga,
 Kaj kun paperoj, moŝto Pasek, oratoro;
 Li preparis por reĝo salutan poemon...
 Pri kio mi parolis, moŝto sinjorina? —
 Pri — paĝio Mazepa... preskaŭ suĉinfano,
 Sed jam fame konata pro siaj petoloj.

SCENO IV

LA SAMAJ. MAZEPA eniras tra la fenestro, nevidate de la aktoroj.

KASTELANINO.

Prezentu al vi tiun ventkapulon, tiun
 Petolulon, Mazepon!

MAZEPA (flanke).

Jen, pri mi parolo...

KASTELANINO.

Prezentu al vi tiun perversan junulon!
 La virin'-malamikon! Serponton! Per haroj
 De siaj amatinoj li plenŝtopis selon —

MAZEPA (riverencante al Kastelanino, subite).

Malvere, sinjorino, — mi petas ne kredi.

KASTELANINO.

Kiel vi enpenetris?

MAZEPA.

Kun luno, tra l' fendoj,
Ĝustatempe, por propran defendi honoron.

KASTELANINO.

Sed kiel vi eniris?

MAZEPA.

Kiel papilio,
Tra l' fenestro, estrino.

KASTELANINO.

Ĉu vi ne mensogas?
Fenestr' — alta...

MAZEPA.

Ŝtup-ŝnuron mi havas el haroj.

KASTELANINO.

De amatinoj?

MAZEPA.

Vere.

KASTELANINO.

Kial tra fenestro,
Ne tra l' pordo?

MAZEPA.

Ĉar tie sinjor' Pasek, kavazaŭ
Cerber' trikapa — sango fariĝas rigida! —
Unu kap' eksilentis, alia komencas.
Ĉar li eble neniam haltos, — mi forkuris.

KASTELANINO.

Mi jam vidas, el domo vi faros inferon,
Kaj malkvieton tra la fenestro enportos.

MAZEPA.

El kie la malbona opini'?

KASTELANINO.

Mi timas

Vian nesolidecon. — Do Dio nin gardu!
Vi ne povas ekzisti sen nova amaĵo.

Sed ĉi tie ekami indas serioze, —
 Enamiĝinte, al mi konfidu, en kiun? —
 Mi, maljuna, silentas. —

MAZEPA (kun mano sur koro).

Kaj mi vin konvinkos.

SCENO V

LA SAMAJ, REĜO, VOJEVODO kaj multaj nobeloj.

VOJEVODO.

Via reĝa majesto, jen mia edzino,
 Humile fleksiĝanta al viaj genuoj.
 Kaj jen — Kastelanino Robroncka el Spija,
 Kaj jen — mia solfilo, la reĝa servisto.

REĜO.

Jen paĝio? ĉi tie?

MAZEPA.

Salut-paroladoj

Kortuŝas min, ploreman, — do tra la fenestro
 Mi venis.

REĜO.

Kaj renflugi povas kontraŭvole.

MAZEPA.

Reĝo, permesu, havi pli bonan esperon.

REĜO (al Vojevodedzino).

Vian manon, estrino. — La flamaj arkaĵoj
 Al ia supertera similas nubeto,
 Kaj vi, Vojevodino...

(Finas la komplimenton, flustrante en orelon.)

VOJEVODO.

Ni sekvu la reĝon,

Iru, moŝtoj sinjoraj, — mi petas, — tre petas!

(Ĉiuj, krom Mazepa, eliras en la pluajn ĉambrojn.)

SCENO VI

MAZEPA (sola).

Strange! juna rotmajstro ĉe duonpatrino
 Belega, — kaj li ŝajnas glacie malvarma;
 Mi apenaŭ ŝin vidis, jam kore degelas...
 Kun ŝi mi volus vivi — aŭ por ŝi perei.
 Moŝto kastelanina! vi bone divenis,
 Ke mi eternan amon ĉi tie enskribos! —
 Kiel sun' mi komencos, fariĝos sunfloro
 Kaj ŝi per la okuloj turnos mian koron.
 (Vojevodo eniras.)

VOJEVODO.

Jen kio? — ĉu vi tablon mian ne favoros?
 Ne malestimu, moŝto sinjora, la manĝon.

(Mazepa riverencas kaj foriras.)

SCENO VI

VOJEVODO, ĤMARA.

VOJEVODO.

Sinjur' Ĥmara! ĉu brilas lampoj en ĝardeno?

ĤMARA.

Jam brulas.

VOJEVODO.

Tuj forrompi tiun interbaron!

La reĝo en kastelo vidu vojevodon —
 Estu al li tre hele — do forigi muron! —

(Homoj forprenas la muron profunde de l' scenejo, montriĝas ĝardeno
 iluminata.)

Belege! — Ĉu jam estas disponoj donitaj?
 Ĉu vilaĝanoj trinkas, ĉu bovo rostita?

ĤMARA.

Ĉio preta.

(Eniras sinjoro Pasek.)

SINJORO PASEK.

La reĝo leviĝas de l' tablo,

Li prenis jam la pelvon por lavi la manojn.

VOJEVODO.

Sinjor' Pasek, muziko ludu polonezon!

(Ili disiras diversflanken, la vojevodo iras al la reĝo.)

SCENO VIII

(Muziko ludas polonezon.)

La REĜO eniras en la una paro, kondukante la VOJEVODEDZINON. Post li iras paĝio MAZEPA kun la KASTELANINO, poste, iom pli malproksime, ZBIGNJEV kun iu sinjorino. Fine la VOJEVODO.

REĜO (al Amelja).

Moŝto vojevodina, jen reĝa festeno!

Se vi konsentas, iros ni tra la ĝardenoj?

AMELJA.

Servistino de l' reĝa moŝt'.

REĜO.

Mi petas sekvi.

(La polonezaj paroj eniras en ĝardenon.)

KASTELANINO (pasante, al Mazepe).

Kaj vi jam enamiĝis?

MAZEPA.

Jam.

UNUA EL SINJORINOJ (al Zbignjev).

Kiel vi pala. —

ZBIGNJEV.

Sinjorino, hieraŭ mi estis la sama.

(Ili eliras. La polonezo revenas el ĝardeno. La Reĝo lasas la manon de vojevodedzino. Ĉiuj paroj disiĝas.)

REĜO.

Estrinoj, volu iri solaj, anser-vice, —

Kaj nun ĉiujn per nova elekto honori.

(La Kastelanino prenas la manon de l' reĝo. Aliaj sinjorinoj elektas danculojn; Amelja restas fronte de l' scenejo, kaj la paĝio flanke. — La tuta polonezo eliras — kaj la balo transiras en la pluajn ĉambregojn.)

SCENO IX.

AMELJA, MAZEPA.

MAZEPA (flanke).

Mi prosperis do kapti manon de neniu
Kaj resti kun ŝi sola. — Mirinda beleco!
Ĉe vi, sur min ekblovis timo nedirebla,
Kiel en sankta loko.

AMELJA (al si.)

Kial kor' malĝojas?

MAZEPA (flanke).

Kruela maltrankvilo tiel min turmentas.

(Al Amelja.)

Ĉu mi povas, estrino, peti vin al danco?

AMELJA.

Volu pardoni.

MAZEPA.

Do ne?

AMELJA.

Ne.

MAZEPA.

Bel-voĉo via

Lernis la harmonion de la najtingaloj;
Viaj okuloj — plenaj de lazur', radioj, —
De steloj lernis esti tiel hele bluaj,
Kaj ĉiam tiel rekte deflugi al tero, —

Permesu aŭdi voĉon — ekvidi okulojn, —
 Ke vi ne koleretas. — Vi tremas? — Neniu
 Venos, ĉiuj kun reĝo en kastel'. — Ni — solaj.
 Stranga land'! kie buŝoj de ĉielaninoj
 Fermas la rozojn, kiuj ne volas ekflori...
 Jen rideto sur lipoj! mi turnos okulojn,
 Ke via palpebrumo min ne pereigu.

AMELJA.

Sinjur' eble vilaĝan simplecon ne ŝatas,
 Sed mi devas konfesi, ke lia parolo
 Tute al mi ne ŝajnas...

MAZEPA.

Adiaŭ, estrino,
 Se mi ofendis.

AMELJA.

Ho! ne.

MAZEPA.

Mi iras — min pafi.

AMELJA.

Tiel ŝerci?

MAZEPA.

Ho, tute ne! — sed mi, ebrie,
 Kapablas! — do mi iras trinki malespere.

AMELJA.

Kaj poste?

MAZEPA.

Sinjurino vidos el fenestro
 Min pafe-mortiĝantan.

AMELJA.

Vi mokas, sinjoro.

MAZEPA.

Kion mi devas fari? Kion? — ludi kartojn
 Aŭ kun reĝo reciti pian litanion?
 Ho, mia kor' malklara — jam nenion kredas.

Al vi, estrin', mi povus ankoraŭ konfesi,
 Vi, sanktulin', aŭskultas eĉ la najtingalon,
 Kaj mi havas pli multe por interparoli
 Kaj vi ne volas aŭdi.

(Al si.)

Ŝi jam ruĝetiĝas.

Bona signo.

(Laŭte.)

Ĉiela! estu sanktulino;

Nur permesu konfesi antaŭ vi, ĉar premas
 Pezege mian koron multo konfesinda. —
 Antaŭ via fenestro sidante, birdeto
 Dum tuta nokto trilas malgravan kanteton.
 Ĉu birdon anstataŭi hodiaŭ ne povas
 Mi? Tio kolerigos vin?

AMELJA.

Dio! ho Dio!

MAZEPA.

Mi jam pri ĉio bone demandis en korto.
 Balkonon vian kovras plorantaj betuloj
 Kaj ornamas lilioj —

AMELJA.

Vi estas sincera,
 Se vi konfesas vian rolon de spiono.

MAZEPA.

Mi estas sen honoro.

AMELJA.

Vi falos abismon,
 Mi havas defendanton, estos defendita.

MAZEPA.

Sed vi bedaŭros tiun, kiu ĉesos vivi.

AMELJA.

Vantaj vortoj, neniu perdas vante vivon,
 Sen espero.

MAZEPA

MAZEPA.

En via tremanta figuro —
Multa por mi espero.

AMELJA.

Nenia, — nenia.

(Foriras.)

SCENO X

MAZEPA, poste la KASTELANINO.

MAZEPA.

Jam fiŝeto ekkaptis la hokon perfidan.
Mi ĵuras : el fenestro ŝi al mi kliniĝos,
Reston faros diablo.

(Eniras la Kastelanino.)

KASTELANINO.

Kie do vi estis,
Sinjoro kortegano? kun kiu babilis?

MAZEPA.

Kun neniu, estrino, —

KASTELANINO.

La koro eniĝis
Profunde! — Mi rigardas atente, — do aŭdu :
Mi vidis, kiel Zbignjev vin observis flanke.
Vi rigidiĝus, se vi lin tie ekvidus,
Ĉar li aspektis kiel kadavro! Bonvolu
Al kaleŝ' doni manon.

MAZEPA.

Do vi nin forlasas,
Moŝto kastelanina?

(Li donas la manon kaj elkondukas la Kastelaninon.)

SCENO XI

ZBIGNJEV kaj la VOJEVODO, kiu dum la tuta sceno elkondukas la gastojn, tenante la ĉapon en mano, kaj riverencante malalte.

ZBIGNJEV.

Koro mia frapas

Kvazaŭ mi svenus. Tie ŝi staris senmove —

Kaj li parolis; estis en ŝi granda timo.

Pri kio li parolis, per kiaj esprimoj?

Ŝi deturnis la kapon, mi vidis dufoje,

Kvazaŭ pro malagrablo. — Mi devus aperi?

Ĉi tiu domo estos tombo por paĝio.

VOJEVODO.

Etingi lumojn! — Reĝo jam iras ripozi.

(Eliras.)

ZBIGNJEV.

Neniu kompatema spirit' al mi diros,

Kion ili parolis? — Ne, mi ne ekdormos;

Mi iros — de la pensoj turmentaj seniĝi,

Lulate de la nokta kviet' en ĝardeno.

Se ŝi ekaŭdos, — mian ŝi rekonos paŝon,

Rememoros, ke estas mi en mond'. — Turmento!

(Eliras.)

SCENO XII

Alia ĉambro en la kastelo.

REĜO, VOJEVODO, kun torĉo, MAZEPA, reĝaj ĉambristoj.

REĜO.

Antaŭ mi, via moŝto, ne fleksu genuojn.

VOJEVODO.

Mi prenos de vi botojn.

REĜO (levante lin el planko).

Vi faras tro multe.

Ni petas, ke vi lasu nin al nokt-reĝino,
Diana, kiu tra la vitroj enrigardas,
Kaj mem iru ripozi. Morfeo postulas
Oferon post ofero al Bakĥus.

(La Vojevodo riverencas kaj foriras.)

Adiaŭ!

(La reĝaj ĉambristoj foriras.)

SCENO XIII

REĜO, MAZEPA.

REĜO.

Donu preĝaron! Brilas ĉielo per steloj;
« Ave Maria, gratias plena ». — Mazo!

MAZEPA.

Reĝo?

REĜO.

Kie dormas ĉi tie miaj korteganoj?

MAZEPA.

Maldekstre.

REĜO.

Kastelestr'?

MAZEPA.

Ne scias.

REĜO.

Stulta.

MAZEPA.

Bone.

REĜO.

« Ave Maria » — kie dormas vojevodo?

MAZEPA.

Mi ne scias.

REĜO.

Stultulo!

MAZEPA.

Aŭdas duafoje.

REĜO.

Kaj vi dormas?

MAZEPA.

Ne dormas.

REĜO.

Kion faras?

MAZEPA.

Skribas

Historion de l' reĝa moŝto.

REĜO.

Ventkapulo!

Historiisto!

MAZEPA (flanke).

Krevu, vi eks-kardinalo.

REĜO.

Kion vi zumas?

MAZEPA.

Versojn —

REĜO.

Ĉar — mi povus veti,

Ke vi aman kunvenon havas nokte.

MAZEPA.

Eble.

REĜO.

Mi scias. — Vi parolis kun vojevodino.

MAZEPA.

Al ŝi mi laŭdis vian reĝan moŝton.

REĜO.

Tamen

Diru veron. Vi vidis ŝin ancor'-hodiaŭ?

MAZEPA.

Se mi nur mian koron ien lokas, tiam
Reĝa moŝto envias min.

MAZEPA

REGO.

Mi ne envias,

Tute ne.

MAZEPA.

Vi malhelpas min, reĝo...

REGO.

Vi lasu

Min trankvile, — trumpetas stultul' en orelojn,
Mi forkuras.

(Li metas sur sin la mantelon de Mazepa, lasitan sur seĝo, kaj
la ĉapelon de Mazepa li metas sur kapon.)

MAZEPA.

Reĝ'! mia mantelo.

REGO.

Vi volas,

Ke sen mantel' ricevu mi febron de l' roso.

MAZEPA.

Reĝa moŝt' havas propran.

REGO.

Kion? junulaĉo,

Vi volas, ke min nokte, en reĝa vestaĵo,
Rekonu tuj la tuta vesperta armeo,
Kaj montru al la reĝo devigajn honorojn... —
Mazo, vi ja ne estas malsana je l' febro;
Se mantelo infektos, eble per stulteco! —
Atendu.

(Eliras en gardenon.)

SCENO XV.

MAZEPA (sola).

Lin diabloj prenu, kadukulon!
Li en paĝi-mantelo ĉe lun' volas iri,
Sub fenestroj frostiĝi, virinojn delogi!

Ortodoksa diablo! malbenita, naŭza!
 Al li hieraŭ harojn grizajn mi elŝiris.
 Atendu! duafoje vi min ne ekkaptos!
 Vere, en la mantelo li aspektas bele;
 Ŝi kapablus malfermi fenestron!

SCENO XV

REGŔO (revenas kun eltirita spado, vundite en manon). MAZEPA.

REGŔO.

Fripono!

MAZEPA.

Reĝ'!

REGŔO.

Perfidul' senhonta!

MAZEPA.

Pro kio vi krias?

REGŔO.

Vi sendis insidanton.

MAZEPA.

Mi?

REGŔO.

Por min mortigi.

MAZEPA.

Mi ĵuras, via reĝa moŝt'.

REGŔO.

Vi min perfidis.

MAZEPA.

Kion mi vidas? Reĝo, sangas via mano!

REGŔO.

Klariĝu, sentaŭgulo! Defendu vin, moŝto.
 La puno vin atendas! — Paŝojn du mi faris,



Elkuras grandegulo, alta kiel pino,
 Kun eltirita sabro — kaj ekhakas blinde,
 Kriante : vi malnobla Mazepa! timulo!
 Vi ne promenos plue, nokte ĉe la luno!

MAZEPA.

Reĝo lin ne mortigis?

REĜO.

Li min ne ofendis.
 Li vin ofendis, tio min tute ne tuŝas.

MAZEPA.

Sed li vundis la reĝan manon, restos signo.

REĜO.

Vi diskrevu! — jen ĉion mi pro vi suferas.

MAZEPA.

Li vidis, ke atakon lian vi forkuris
 Vundite?

REĜO.

Vidis — sango fluis el la glavo.
 Kaj li kriis : Mazepa, kia timulaĉo,
 Vundite jam, de l' sabro forkuras kanajlo!

MAZEPA.

Reĝo lin ne mortigis?

REĜO.

Ĉu min malutilas,
 Se oni timulaĉo vin nomas?

MAZEPA.

Neniel.

REĜO.

Ofendoj apartenas ĉiam al personoj,
 Al kiuj direktitaj estas, kaj al nomo.

MAZEPA.

Sed morgaŭ, reĝa moŝto, sango rericivos
 Siajn rajtojn.

REĜO.

Ĝi kian rricevos rajton?

MAZEPA.

Timulaĉo nomiĝos morgaŭ sanga mano.

REĜO.

Kion vi diras?

MAZEPA.

Tion pripensu refoje.

REĜO.

Iru kaj veku mian ĉambran servistaron,
 Paku, — mi forveturos antaŭ sunleviĝo.
 Nokt' malbenita!

MAZEPA.

Nokto malbenita.

REĜO.

Fine

Ni forveturos.

MAZEPA.

Fine do ni forveturos.

REĜO.

Mortigisto babilos.

MAZEPA.

Li ne estos muta.

REĜO.

Nokt' malbenita!

MAZEPA.

Falas ofend' sur personon!

REĜO.

Kion vi zumas?

MAZEPA.

Reĝo, mi trovis rimedon,
 Por resti morgaŭ tie ĉi.

REĜO.

Nu? mi scivolas.

MAZEPA

MAZEPA.

Timulaĉo nomiĝos morgaŭ sanga mano.

REĜO.

Nu? do kiel defendos vi mian honoron?

MAZEPA (prenas la spadon de l' reĝo kaj vundas al si mem la manplaton).

Reĝa moŝto, jen ŝprucis sang' el mia mano.

REĜO (korpremante lin).

Kara infan'!

MAZEPA.

Vundeto ne faras doloron!

Reĝo! por ŝi, mi eble vundus mian koron.

AKTO DUA

SCENO I

Galerio kun arkadoj malfermitaj kontraŭ la ĝardeno.

REĜO, VOJEVODO.

REĜO.

Afero ne kredebla, moŝto vojevoda!
Paĝio atencita...

VOJEVODO.

Sur kadavr'-portilojn
Min metu, se mi ion komprenas, ho reĝo,
En tiu konfuzaĵo.

REĜO.

Ĝi restu jam tiel.
Vi, vojevodo, lasu juĝan esploradon!

VOJEVODO.

Kion? Reĝo! ĉi tie mia nobeleco
Suferas ja difekton, — mortigo en domo!

REĜO.

Al neniuj okazis granda malbonaĵo;
Paĝio nur trouzis sian ventkapecon,
Kaj li ricevis, moŝto, kion li meritis.
Bone, li ne logiĝu per bel-okuletoj.
Nu — kion vi meditas?

MAZEPA

VOJEVODO.

La virin'-logilo,
 La paĝio — li povas terure sin brogi!
 Li gardu sin, ne serĉu tie amatinojn —
 La dom' ne estas...

REĜO.

Kial vi ŝiras or-zonon?

VOJEVODO.

Do la paĝio serĉis dum nokto virinon?

REĜO.

Vojevod', mi ne scias!

VOJEVODO.

Via reĝa moŝto,
 Permesu — mi foriros — meti matenmanĝon.

REĜO.

Do vi estas libera.

(Vojevodo eliras.)

SCENO II

REĜO (sola).

Maljunul' ĵaluza —
 Karakter' abomena ĉe homoj maljunaj!
 Kaj ridinda! — Lipharojn li ŝiris kaj zonon,
 Kaj ĉion en si fermis, nur sango-koloro
 Aperis sur la vangoj maljunece velkaj.
 Li skuiĝis, sur ŝultroj kvazaŭ portus rokon.
 Mi vidis kiel brilis la ruĝa pupilo,
 Kiam : « virin' » dirante, li pensis : « edzino ».
 Ho, vojevodo! same kiel vi aspektis
 Radziejowski, kun svedoj kiam li konspiris.
 Kiu? — Vojevodino?

SCENO III

REĜO, AMELJA.

AMELJA.

Venis plendi.
Mi, reĝo-sinjoro,

REĜO.

Mi estas feliĉa, fier!

AMELJA.

Reĝo! ankoraŭ tremas mi pro la timiĝo;
Granda ofendo — mian vizaĝon flamigas.
Mi ne povas paroli. — Ne rigardu vangojn.

REĜO.

Kiu volus sur vangoj vidi palan floron,
Kiam vi tiel mire-bele ruĝetiĝas.

AMELJA.

Reĝo, vi min defendos, defendos — mi fidas,
Se vi, estro, ne volas min vidi en tombo...
Min kortegano via insultis.

REĜO.

Kiele?

AMELJA.

Jen, laŭ kutim' hodiaŭ mi ĉe sun-leviĝo
Iris al mes'. — Renkontis min sinjor' Mazepa
Sur mallarĝa tabulo-pontet' en ĝardeno.
Li ekgenuis. — Pala mi iĝis kaj larma,
Sed ne volis reniri, por ne montri timon;
Li diris, ke rekonis min laŭ roz-odoro,
Ke suno leviĝanta lin pri mi sciigis.
Hontante pro vestaĵo mia malpli deca,
Ĉar mi ja ne esperis kun iu renkonton —
Mi mallevis okulojn, kaj, en rivereto,

Fiŝetojn volis peti al helpo, konsilo...
 La senhontul', vidante la palan vizaĝon,
 Komprenis, ke min, kune kun rozo-koloro
 Forlasis hont'. — Tremantan time sur ponteto
 Li haltigis, ke buŝon mi sentis sur vango.

REĜO.

Ho! satano!

AMELJA.

Do reĝo, jen plendas mi honte...
 Kaj fidas, ke, sinjoro, vi ŝirmos virinon.

REĜO.

Juĝu lin mem.

AMELJA.

Do kiel! ne vi — sed mi juĝos?
 Reĝo en nia domo! —

REĜO (flanke).

Malbenita Mazo!

(Al Amelja.)

Estrin', en kodo estas krimoj multenombraj,
 Sed ne ekzistas tia krim', nek ĝia puno.

AMELJA.

Ho reĝo! al li diru, ke li dom-estrinon
 Malhonoris — malnobla estas lia koro,
 Nek la koro de polo, nek de kavaliro;
 Diru, ke por virinoj sola defendilo —
 La malestimo — tial mi lin malestimas.
 Se mi eĉ estus iu kromvirino lasta,
 Estos por li ankoraŭ tro fiero, ĉasta.
 Diru al li : estante sen gardo, mi povus
 Havi venĝanton — sed li estas timulaĉo,
 Kaj malestimo mia naskis nur kompaton.
 Diru, reĝo, li faris malnoble, fripone!
 Diru kaj lin forpelu — ke mi lin ne vidu.

REĜO.

Per kio mi meritis, ke vi kun la plendo
Venis al mi?

AMELJA.

Mi pensis, ke reĝa ĉeesto
Ne hontigas...

REĜO.

Feliĉa — la reĝo, al kiu
Modesto fidas tute kaj al li konfidas;
Feliĉa — vin rigardi, post freŝa plorado,
Per silentaj plend-larmoj ankoraŭ brilantan.
Ho! ne ploru, mi puni paĝion promesas —
Mi punos kaj lin via okulo ne vidos.
Nun pri io alia ni interparolu —
Bela vojevodino — mi vete divenos
Vian nomon; ĝi estas malgaja kaj bela —
Do via baptonomo?

AMELJA.

Amelja.

REĜO.

Kun Dio!

Najtingalo ĉi-nokte sub miaj fenestroj
Kantis la nomon, mi ĝin aŭdis dormetante.
Nun el kor' ne forigos mi la najtingalon.
Bela Amelja! tiel velki, for de homoj?
La kastel' apud lago — belege metita,
Sed kiel mia franca arestej' — malgaja...
La fenestroj, arkadoj, la tiliaj ombroj...
Sed ĉi tie dumvive resti — malfacile —
Amelja! ĉu vi en la kastel' — ne enuas?
Ne deziras vin distri? — Tie ĉi malgaje
Fluas tagoj, mi mortus en tia kastelo!
Jen arestejo, kiel mia franca turo!
Ah! ankaŭ tie estis junulin' helvanga,
Kiel vi, sinjorino, — pri ĉio zorgema,

Tiam al mi agrabla kaj nun memorinda...
 Vi estas la pli bela, sed iom simila —
 Vi — malgaja, ŝi estis knabino flirtema. —
 Ŝi ofte la gardistojn trompante, alportis
 Leteron el hejmlando en violbukedo —
 Nun violoj min ĉiam pri ŝi memorigas.

AMELJA.

Kiel nomiĝis tiu knabin' malfeliĉa ?

REĜO.

Klaŭdia...

AMELJA.

Do ŝi amis kaj mortis sopire ?

REĜO.

Nun ŝi estas vidvino Hôpital'-marŝala.

AMELJA.

Ŝi forgesis ? perfidis ?

REĜO.

Ni ŝanĝu la temon.

Hodiaŭ, kiam pikas min dornoj de l' krono,
 Multe mi donus por la forpasintaj jaroj,
 Kiam mi, post la krado, ŝiman havis panon
 Kaj kor' amanta batis apud mia koro! —
 Ho, kiel nun agrable estas al solulo
 Trovi konfidatinon de malgaja sento —
 Du grandajn larmojn, — fulmon en okuloj, kiu
 Kun fajro de kolero portas la pardonon!
 Tian sopiron aŭdi pri la propra sorto,
 Havi molan blank-manon por larmoj-sekigo,
 Lasi por ĉiam tronon, kronon — sen amikoj
 Forlasi landon, homojn kore venenitajn,
 Lasi ĉion, krom unu ŝi, ne forlasonta.

AMELJA.

Mi povas iri ?

REĜO.

Restu, estrino, momenton, —
Falas la kron' el mia kapo kliniĝanta
Antaŭ vi, sorĉantino!

AMELJA.

Mi foriros, reĝo?

REĜO.

Ho! fiero — vi donis kison, nevolontan,
Al frunto de paĝio — nun renkontos —

AMELJA.

Vidas

REĜO.

Frunton en kron'.

AMELJA.

Malvarman —

REĜO.

Do finu.

AMELJA.

Senhontan.

(Foriras.)

SCENO IV

REĜO, VOJEVODO.

VOJEVODO (renkontante la forirantan Ameljon).
Jen kio estas? — Iru for en viajn ĉambrojn.

REĜO.

Tiel severe?

VOJEVODO.

Reĝo, mi diros malkaŝe :
En mia kapo io funebre sonoras,
Sango verŝita kuŝas sub edzin'-balkono.

REĜO.

La paĝio kuraĝus?

VOJEVODO.

Reĝo, mi vin petas :
 Forsendu el kastelo la oran pupeton,
 Forsendu, reĝa moŝto, ĝi estas vundita ;
 De mi tuŝite, povas rompiĝi en pecojn ;
 Edzinon ne suspektas mi, — sanktan virinon —
 Sed la paĝio finos ĉi tie malbone —
 Mi eble enuigas vian reĝan moŝton,
 Sed diras, se vi plue volas ĝui servojn
 De via kortegano, forsendu lin baldaŭ :
 Li ĉi tie perdiĝos kiel mon-saketo.
 Oro logas — li ora — do estos ŝtelita —
 Forsendu lin, li havas belan figureton,
 Pri li mi timas, reĝo.

REĜO

Mia vojevodo.

Mi vidas, ke varmega sango en vi fluas,
 Kaj mi ĝojas, ke estas vi fortplena, fajra.
 Sendu al mi paĝion — mi skribos leterojn —
 Kaj sendos en Varŝavon.

VOJEVODO.

Mi donos ĉevalon.

(Foriras.)

SCENO V

REĜO, poste MAZEPA.

REĜO.

Jen mi pekis infane — li ricevos batojn.
 Bone, paĝi' malhelpas en miaj intencoj,
 Kaj min, kiel videble, senhonte perfidas,
 Kaj bele ge la propran protektas aferon.

Bone, mi kun leteroj forsendos paĝion —
Mi restos sola, baldaŭ helpo al mi venos.

(Eniras Mazepa.)

Vi al mi antaŭtempe timigis la cignojn.
Vane vi mordas lipojn, mallevas okulojn.
Estis diversaj plendoj kontraŭ vi, gapulo.
Vi migros kun leteroj, for, al la reĝino.
Post mi en kabineton!

(Eniras en flankan ĉambron.)

MAZEPA.

Jen kiel salite!

Li neniam komencis tiel malafable.

REĜO (malantaŭ la scenejo).

Al mi en kabineton!

MAZEPA.

Kardinal', diablo!

(Eliras post la reĝo.)

SCENO VI

ZBIGNJEV (eniras).

Ĉi tien la paĝio iris — mi atendas.
Nun, tage, juĝu ambaŭ nin malvarma fero.
Ho! lin mortigi! poste ankaŭ min mortigi!
Kian teruron kaŝas mort' kvieta? — Kial
Ni timas teron, kiu fruntojn makuligas,
Dormon kun kunmetitaj sur la brusto manoj...
Mort' — antaŭ mi ne estas voj' alia — Dio!
Se iu al mi dirus hieraŭ, ke povas
Esti sur tero homo viva, pli kuraĝa
Ol roz-folio, kiu kovras ŝian fronton,
Pli proksima al ŝia buŝ', ol kanario,
Ol aer' pli feliĉa, ol vesper'-muŝetoj,
Kiujn mi ĉiutage en koro envias,

Mi ne scias!... hieraŭ ŝajnis al mi krimo
 Tuŝi la buŝon — eble hodiaŭ, freneze —
 Do la sama flamanta ardo ĵetas fajron
 En korojn de aliaj, kulpiĝas de brulo,
 Ĵetegas al piedoj de l' sorto — la homon
 Kiel kadavron.

SCENO VII

VOJEVODO, ZBIGNJEV.

VOJEVODO.

Filo, vi iun atendas?

Vi faris sur marmoro fendetojn per sprono?
 Jen kia desegnaĵo — kap' mortula? — Filo!
 Do vi duelos? honto! — Li estas plebejo;
 Tian la vojevodo bastone-mortigos.
 Mi sendis Ĥmaron — mi lin instruos respekton —
 Ameljeto — nekulpa de l' sang' sub fenestro;
 Sed paĝi', — opinion, ke ŝi senhonora,
 Sub la bastono-batoj renvokos, forbojos.
 Lasu ĉion al tiu ĉi maljuna frunto —
 Vi pensas, ke patrino ne sciis pri tio?

ZBIGNJEV.

Ho! pri tio mi ĵuros —

VOJEVODO.

Estu glor' al Dio,
 Ke li sanktan virinon al mi edzinigis —
 Ĉu vi rimarkis, ruĝajn ŝi havis okulojn
 De l' ploro...

ZBIGNJEV.

Ĉar suspekto ĉiu dolorigas. —

VOJEVODO.

Mi sendis homojn — ili ĉe l' granda tilio
Apud drinkej' atentos ĉi tiun friponon.

ZBIGNJEV.

Sed, se reĝo sciiĝos?

VOJEVODO.

Reĝo — mia estro,
Sed ne en mia domo.

SCENO VIII

LA SAMAJ. REĜO kaj MAZEPA eliras el la flanka pordo.

REĜO.

Moŝto vojevoda!
Paĝio al Gluĥovo veturas, kaj poste
Revenos en Varŝavon, laŭ mia decido.
Permesu, ke li viajn ekpremu genuojn;
Igu mallevi pontojn!

VOJEVODO.

Li foriru sane...
Kaj de mi li akceptu la turkusan sabron,
Kaj belĉevalon, nigran, li prenu por vojo.
La ĉeval' — akrevida, rapid'-piedulo...
Li feliĉe vin portu, tra nia kamparo,
Al la feliĉa celo.

MAZEPA.

Mi, laŭ via volo,
Akceptas la donacojn. — Bela memoraĵo
Bona sabro, pli bona la nigra ĉevalo.
Ĝi estu la ĉevalo — kiu tra arbaroj
Kaj herbejoj paĝion portos ĝis sur tronon,
Kiel aŭguris antaŭ jaroj ciganino.

REĜO.

Do kuru sur herbejoj, paĝioflugila,
 Kaj memoru sur trono min, vian liganon.
 Nun, vojevodo, iru ni trinki la vinon
 Por feliĉa vojaĝo de la pretendanto
 Al la krono.

(Al Mazepa.)

Atentu bone pri leteroj.

(Li foriras kun la Vojevodo.)

SCENO IX

MAZEPA, ZBIGNJEV.

ZBIGNJEV (eltirante la sabron).

Sinjor', al sabro!

MAZEPA (eltiras la sabron).

Tion mi bone komprenas.

ZBIGNJEV.

Gardu kapon!

MAZEPA.

Rotmajstro! mi kozaka filo,
 Scias skermi; sed tute ne sentas volonton
 Bati per sabro de l' patro kirason de l' filo,
 Nek la vojevodidon, junan kiel rozoj,
 Mortiginte, forkuri sur negr' vojevoda.
 Cetere mi al moŝto, el humila koro,
 Konfesas, ke min tuŝis nun ia pentemo,
 Ke mi hontas pro rolo en kastel' ludita.
 Do, se la estimata Zbignjev ĝin permesos,
 Ni korprenu nin frate kaj disiru pace.
 Ia sorĉ' estis en la kastel', lun', ĝardeno,
 Kiu min frenezigis, per amo ardigis;
 La sorĉo daŭras, antaŭ vi faras humila

Kaj per sincera sento min al vi bruligas.
 Kion vi diras, moŝto? ĉu permesas koro?
 Ĉu proksimiĝas al la proponita paco?
 Kredu al mi, forgesu ni disputojn, estu
 Amikoj.

ZBIGNJEV.

Ĉu vi mokas? aŭ timas, sinjoro?

MAZEPA.

Ĉiu estu gardanto de propra honoro.
 Fidu, mi humiliĝi scias sendifekte.

ZBIGNJEV.

Vi forkuris ĉi nokte?

MAZEPA.

Amanto de l' luno!

Vi estas certa, ke mi mem de vi forkuris?

ZBIGNJEV.

Dio! kiel serpento li siblis dolore!
 Deprenu ganton — sango signas vian manon.

MAZEPA.

Vi estas certa, ke al via fer' kaj brako
 Mi ŝuldas, via moŝto, la sangon sur mano?

ZBIGNJEV.

Malnobla elturniĝo.

MAZEPA.

Mi ne elturniĝos.

Jen kio? — mia mano estas vere sanga,
 Tamen ne vi ĝin vundis.

ZBIGNJEV.

Io kurioza!

MAZEPA.

Moŝto, kiam pli bone vi konos la mondon,
 Scios, ke iam sangon aŭ honoron perdi
 Ni devas por la savo de karaj personoj.

Vi ankoraŭ neniajn spertis provoĵn, moŝto,
 Vi tamen ĵus en tia troviĝas okazo,
 Ke nek bruon kuraĝon, nek feron postulas
 Honoro de persono al vi la plej kara,
 Sed singardan prudenton — jen la vera arto :
 Havu fajran animon, vizaĝon glacian,
 Kaj en tombon forportu korsekreton vian!

ZBIGNJEV.

Mi nenian sekreton havas, por ĝin kaŝi.

MAZEPA.

Do eble mi eraras. — Ĉiu devas trinki
 Maldolĉon el kaliko sia; mi kompatas
 Tiun, kiu per kora turment' sin venenas.
 Mi malĝojis, en nuboj de l' sort' ekvidinte
 Du estaĵojn sen ia ĝemo suferantajn —
 Silentajn, kun la koroj pli sangaj ol Krista.
 Ili diras : domaĝe! — aldonas : por ĉiam!
 Mi, infano, vidante ĉi tian destinon,
 Tuj eksentis sinceran, grandan kor-suferon,
 Kompaton — kaj oferus min mem.

ZBIGNJEV.

Sed por kiu?

MAZEPA.

Mia sekret'.

ZBIGNJEV.

Al sabro!

MAZEPA.

Do tiel severe?

ZBIGNJEV.

La koron mi elŝiros —

MAZEPA.

Kial vi paliĝis?

Iu kiso eterne fermis mian buŝon.

ZBIGNJEV.

Vi mensogas malnoble! —

MAZEPA.

Do nepre?

ZBIGNJEV.

Al sabro!

MAZEPA.

Vi ŝin amas.

(Ili batalas. — Zbignjev per la pinto de sabro disŝiras kaj eljetas la reĝajn leterojn, kiujn la paĝo estis kaŝinta ĉe la brusto.)

ZBIGNJEV.

Vi havas!

MAZEPA.

Kaj vi pli ricevos.

(Mazepa elpuŝas la sabron el la mano de Zbignjev kaj faligas lin sur genuon.)

ZBIGNJEV.

Nun profitu la sorton, trapiku la bruston!

MAZEPA (levante lin).

Zbignjev! Mi duafoje petas vian moŝton
 Pri fratec', amikeco! Forlasu la venĝon.
 Mi per paroloj logis koleron, duelon,
 Por ekvidi, ĉu estas vi el homoj unu,
 Kiu en patra domo uzas spionadon
 Kaj senigas de paco grizan maljunulon. —
 Aŭ ĉu vi estas nobla, sed tre malfeliĉa!
 Nun! sincere mi volas esti via frato.

(Zbignjev jetas sin en la ĉirkaŭprenon de Mazepa).

Ho Zbignjev! malpacanta kun mizera mondo
 Per koro, kiu ardas — mia kara, nobla!
 Vi plaĉis al mi — kiel kavaliro antikva
 En ĉi-kastelo — kaj vi gajnis mian koron.
 Aŭskultu! — via brulo, ankoraŭ fajrero,
 Jam vin konsumis kaj vin faris jam velkinta.
 Vi ankoraŭ neniel makulita, kulpa; —
 Via pieco en ŝiaj safiraj okuloj

Lasis ĝis nun trankvilon kaj la anĝelecon;
 Sed ĉi tio ne daŭros eterne, ne longe!
 KREDU al mi, vi iĝos servisto de l'sorto,
 Ĉar esti ĝia estro neniu kapablas.
 Do lasu ŝin ĉi tie — rozujon florantan,
 Ŝi brilu kaj silente en suno forvelku;
 Sed vi, forkuru! vin jam kaptas per flugiloj
 Terura brul-spirito — vi devas forkuri!
 KREDU, ekzistas amoj sen Dio, sen steloj;
 Ili baldaŭ la koron pistos, enuigos,
 Makulos, tiomfoje vekos senbezone,
 Tiomfoje en dormon de stultiĝo lulos,
 Ke fine de memoroj fonton malklarigos. —
 Same al vi okazos. Ni veturu kune!
 Kiel la papilioj, per vento turnataj,
 Ni traflugos fenestrojn de reĝa kortego,
 Kie gapuloj, en la koloraj kontuŝoj,
 Kiel kuloj ĉirkaŭas maljunan francinon.
 Ni ĉi tiun maljunan mondon tut-renversos,
 Per tinto, rido, moko plenigos la salonon!
 Mia kor' estingiĝu — mi ĝin rebruligos
 Ĉe l' fajro de la via — kiam dia fajro
 Ankaŭ en vi formortos — tiam zorgoj, larmoj
 Ne revenos, kaj kantos ni kune « victoria »!
 Vi vidas jen, ke mia maldolĉa prediko
 El okul' via premis larmojn, kara Zbignjev —
 Nun kiel?

ZBIGNJEV.

Mi veturos.

MAZEPA.

Hodiaŭ, ĉe l' arbo,
 Apud drinkej' atendos mi vin por vojaĝo.

ZBIGNJEV.

Ne — sur alia vojo —

MAZEPA.

Ĉu tie Rakoĉi

Kun arme'?

ZBIGNJEV.

Ne demandu, mi hontas malkaŝi —

MAZEPA.

Do mi distros min en la proksima urbeto
 Per ostludo kun iu militist' maltaŭga.

ZBIGNJEV.

Atendu — mi seligos por vi brav-ĉevalon,
 Vento vin ne atingos!

MAZEPA.

Iru, sincerulo.

(Zbignjev foriras.)

SCENO X

MAZEPA (sola).

Sinjur' Mazepa! nun vi aspektas alie.
 Kien forigis via masko orumita?
 Vi kiel pastr' parolis, diablon forpelis,
 Kiel en kot' en virto vadis, vin forgesis —
 Post du tagoj da tia humoro — mi mortos,
 Droniĝos en ĉielo! — Sed diabl' revenos.

(Levas el tero la reĝajn leterojn.)

Ha! jen reĝaj leteroj! — Reĝ' ion komplotas —
 Dio! sigel' duone tranĉita per sabro —
 Mi kaŝos, ĉar mi timas sciemon, kanajlon,
 Malamikon. — Sigelo — duone rompita...
 Do nur iometete —

(Enrigardas en la leterojn.)

« Mi vin petas, moŝto »

Li skribas al Gluĥova komandant' —

(Traflugas per okuloj la leteron).

Ĉielo!

Ĉio estas por homo-rabo disponita —
 Ortodoksulo rabas vojevod'-edzinon!
 Plue — videbla estas post-skribo malsupre —
 Ĉu mi blinda? ĉu perdis vidsenton okuloj?

(Legas.)

« Kaj sinjoron Mazepa'n tuj fermu en turo,
 Kaj gardadu lin tie ĝis plua dispono. »

(Kaŝas la leterojn).

Ah, vi ortodoksulo! — min? en arestejon?
 Vojevod'-junedzinon en viajn manaĉojn?
 Do vi pensas, ke ĉiuj ni estas gapuloj?
 Ke muŝetoj en viaj kaptiloj pereos?
 Vojevodinon vidi mi devas ĉi-nokte.
 Nur al ŝi mi konfesos infanan sciemon —
 Timi? — Mia lerteco, vigleco, honesto
 Ĉion savos. — Mi vidos ŝin hodiaŭ nokte —
 Ŝia honor' kaj propra mort' — en mia povo;
 Tion mi bone gardu!

SCENO XI

MAZEPA, ZBIGNJEV revenas.

ZBIGNJEV.

Ĉevalo atendas.

MAZEPA.

Ĝis revido.

(Eliras.)

ZBIGNJEV (sola).

Finita afer' — mi fleksiĝis
 Antaŭ la malfeliĉo! Mi finis — pereis.
 Ĉu certe malgajeco homon anĝeligas?
 Kiom da malkvietaj amoj li evitis,
 Tion havos ĉe Dio? — Mi nun malaperos

Kaj en ĉi-lando oni pri mi jam ne aŭdos —
Sed kun kia terura silent' post mult-jaroj
Ĉerkoj de maljunuloj en kavo kunvenas,
Kvazaŭ neniam estus konatoj — kaj naskas
Vermaron abomenan. — Rigardante oslojn,
Kiu al homoj tiam memorigus amon,
Strangan ridon de ĉerkoj ricevus responde,
Konfuzo lasus pluan mistikan konfeson!
Tempo ĉion absolvas. — Feliĉecon trovas,
Kiu mordantan koron supervivi povas!

SCENO XII

ZBIGNJEV enmedita. Oni vidas AMELJAN proksimiĝantan sur la alia flanko de arkadoj. PASTRO ŝin sekvas. AMELJA ekstaras antaŭ ZBIGNJEV kaj ekbatas per lilio lian vizaĝon.

AMELJA.

Vi malĝojas?

ZBIGNJEV.

Ne — plumbe pezas kapo mia.

(Amelja donas al Zbignjev la lilion — sed la pastro, post ŝi staranta, elŝiras la floron el la mano de Amelja kaj parolas severe.)

PASTRO.

Por preĝejo! — anĝela estas flor' lilia.

AKTO TRIA

SCENO I

Ĉambro de Vojevodo.

VOJEVODO, HĜMARA.

VOJEVODO.

La paĝio ĉi tie — en ĝarden'?

HĜMARA.

Mi vidis.

VOJEVODO.

Prenu pafilon — provu, ĉu forsaltas ĉano.
Kial vi min rigardas? — Kolektu la homojn;
Sed mallaŭte, ke reĝa moŝto ne vekigu —
Iru — estu kun homoj en ĝarden'!

(HĜmara eliras.)

Ho, Kristo!

Jen afer'! en kastelo mia oni ĉasas

Amanton de l' edzino mia! — Jezu! Kristo!

Donu al la mortintoj la lumon eternan!

Ili mortos! infere mortos!

(Eliras armite.)

SCENO II

Loĝejo de VOJEVODO. Fenestro malfermita kontraŭ la balkono, unuflanke
alkovo ŝirmita per kurtenoj.

MAZEPA (eniras tra l' fenestro).

Ĉiuj dormas,

En la ĉambroj nenia bruoj, nek brileto.

Bonege — jen virina ĉambro! — Ŝi forestas?
 Eble ŝi en ĝardeno promenas medite,
 Aŭ ĉe siaj virinoj —

(Montrante la alkovon.)

Eble tie dormas?

Kion fari? rigardi? — Alkov' malbenita!
 Plej danĝera el ĉiuj embuskoj, alkovo!
 Post la kurten' malpeza, fleksiĝa, purpura,
 Ŝi dormas, songe-roza, kvieta. — Diablo!
 Kiel vi min turmentas —

(Enrigardas en la alkovon kaj revenas.)

Malplena. — Mi ĵuras,

Ke mi pensis honeste, tuŝante kurtenon.
 Kion fari? — Ŝi venos — mi iros vestiblon,
 Sur ventumil' skribinte al ŝi kelkajn vortojn.

(Skribante.)

Forigu la virinojn — mi estas...

(Ĵetas la ventumilon.)

Jen kio?

Paŝoj de du personoj — ho, fatalaj muroj!
 Se ili min malkaŝos — mi min morte-pafos! —
 (Eniras en la alkovon kaj kuntiras la flank-kurtenojn.)

SCENO III

AMELJA kaj ZBIGNJEV.

AMELJA.

Do estas via lasta kun mi adiaŭo?

ZBIGNJEV.

Jes, patrino.

AMELJA.

Vi aŭdas kanton najtingalan?

Mi ploremas — mizera, bedaŭrinda!

ZBIGNJEV.

Kial?

AMELJA

Mi ne scias — nenion mi volas en mondo,
 Kaj tamen mi ne estas feliĉa! Ne scias
 Mi la kaŭzon. Mi sidis kun vi sub lariko —
 Al mi ŝajnis, ke ia terurega horo
 Sonas en nokt-aero. — Hieraŭ pinglito
 Mia turkusa, kiun post patrin' mi havis,
 Rompiĝis — bagatelo! — tamen sur kovrilo
 De preĝolibro notis mi kiel malbonan
 Tiun tagon — ho Dio! kial vi intencas
 Forveturi? — Neniam vi tion parolis —
 Mi restos sola! — tamen vi reen veturos?

ZBIGNJEV.

Ne patrin'.

AMELJA.

Ne! — vi sekve neniam revenos?

ZBIGNJEV.

Neniam plu! neniam! neniam!

AMELJA.

Malgaje

Vi kantas, kiel sturno, kiu unu vorton
 Senkomprene ripetas —

ZBIGNJEV.

Patrino! adiaŭ!

AMELJA.

Venu moŝto! genuu — vi tiel senkore
 Adiaŭas? — Kaj diras, ke jam por eterne!
 Mi ne komprenas! — Venu — via frunt' terure
 Malvarma.

ZBIGNJEV (ekgenuas antaŭ ŝi).

Ho patrino! patrino! kompaton! —

AMELJA.

Silentu! mi komprenas — vi falis malalte!
 Vi antaŭ mi terure falis — Dio gardu —

Mi nenion — krom larmoj — povas — mi suferas
Mem. — Foriru. —

ZBIGNJEV.

Kompaton!

AMELJA.

Krom larmoj — Makulo

Estas — por mia pura animo — paroli
Kun vi, kvazaŭ komprenus mi. — Nenion scii
Mi volas — sed eterne por vi preĝos Dion. —
Ne timu, ni — senkulpaj; Di' suferojn sendas,
Sed ni povas trankvilon elpeti ĉe Dio —
Je eterne adiaŭ, sinjor' — mi, malriĉa,
Krom larmoj pli ne havas. — Vi ne makuliĝos,
Se klinite per larmoj mi vin superverŝos —
Vi memoros la larmojn! Mi petas, mi petas!
Petas memori larmojn — kaj min! — Mi suferas
Grandan turmenton, tamen ne pensu malbone
Pri mi, ĉar tion diras mi nun senkonscie.
Adiaŭ! —

ZBIGNJEV (volas leviĝi kaj svenas).

Mallumiĝas —

AMELJA.

Aŭdu! iu venas

Ho leviĝu! leviĝu! — la patro —

(Al eniranta Vojevodo.)

Sinjoro!

Savu — la filo svenis ĉe miaj piedoj.

SCENO VI

LA SAMAJ, VOJEVODO, ĤMARA.

VOJEVODO (al homoj post la scenejo).

Gardu pordojn, fenestrojn. — Honoro savita —
La filo garde-staris —

MAZEPA

(Al Amelja.)

Ĉu vi lin venenis?

AMELJA.

Mi?

VOJEVODO.

Senhonora!

AMELJA.

Edzo!

VOJEVODO.

Vi sentis amanton

En alkovo, kaj sorĉojn uzis kontraŭ filo.

Li eniris kaj svenis.

AMELJA.

Vi diras?

VOJEVODO.

Perfide

Vi scias elturniĝi, ho senhontulino!

Ĥmara! al fil' kandelon metu antaŭ nazon,

Ĉu li vivas?

ĤMARA.

Li spiras.

VOJEVODO.

Portu en ĝardenon.

ZBIGNJEV (rekonsciiĝante).

Kie mi estas? — patro!

VOJEVODO.

Nur sen mistifiko!

Sinjor' filo, ne kaŝu vin, mi bone scias

Tutan aferon. — Fulmobatoj min frakasu!

Dio, mortigu ambaŭ nin per via fulmo,

Kaj ŝin kulpan, juĝotan! la ruzan mustelon!

Malĉastulinon!

ZBIGNJEV.

Patro! ŝi estas senkulpa!

VOJEVODO.

Ne... ŝi estas, laŭdire, virino kompleza,
Pli nenio — ŝi iĝas nur —

ZBIGNJEV.

Patro! pro Dio!

VOJEVODO (Al Amelja).

Kiel vi ploras! Kiel timego vin skuas!
Ha! ĉi tie terura afero okazos. —
Vi estis, sinjorino, tro facilanima,
Tro malprudente kaŝis vi konduton vian —
Do estos nun funebraj vualoj kaj ĉerkoj
En preĝejo. Pretiĝu! jen afer' diabla.
Ho! kiel estas via frunt' senhontigita!
Virin' alia estus jam teren falinta,
Kisus miajn piedojn.

AMELJA.

Mi estas humila,
Sed senkulpa, sinjor'.

(Zbignjev falas al liaj piedoj.)

VOJEVODO (al Zbignjev).

Vi kuraĝas propeti?

ZBIGNJEV.

Ne, mi mem estas —

VOJEVODO (interrompante lin).

Do vi, — kun duonpatrino

Kuniĝis —

ZBIGNJEV.

Patro!

VOJEVODO.

Kontraŭ kap' de maljunulo,
Por ĝin kovri per honto! — Dio donu sanon!
Vi bonege ĉi tiun protekton aranĝis.

ZBIGNJEV.

Patro! se havus fulmon vi, mi ĝin estingos
Per mia sango, tiun kulpon mem mi pagos!

VOJEVODO.

Filo serpento-sanga! Kadavro malvarma!
 Senanima! — Nenia koler' vin flamigas?
 Ĉu la junan ostaron tuŝis paralizo?
 Aŭ ĉu estas nur via kor' paralizita?

ZBIGNJEV.

Patro! ĉi-vortoj estas por mi plej doloraj.
 Cetero ne turmentos, ĝin atendas filo.

VOJEVODO (al Amelja).

Vi, sinjorino, havas viron en dormejo.

AMELJA.

Mi?...

VOJEVODO.

Rigardu ŝin, kiel tuta ŝanceliĝas,
 Ŝi baldaŭ falos, svenos.

AMELJA.

Ho, ne! mi ne svenos.

Dia patrino! estu kun mi en ĉi-horo!

VOJEVODO.

Mi ĵuras, ke amanto via tuj pereos.
 Sinjor' Ĥmara, traserĉu la alkovon!

AMELJA (haltigante Ĥmaran).

Haltu!

Unue mian bruston traigu per glavoj,
 Antaŭ ol vi kurtenon tuŝos — aŭdu, edzo!

VOJEVODO.

En via ĉambro estas vir', — ho, vi, serpento!

AMELJA.

Zbignjev, neniŭ estas tie en la ĉambro!

VOJEVODO.

Ni vidos.

ZBIGNJEV.

Patro! antaŭ ol vi paŝos sojlon,
 Pripensu, ĉar okazos io terurega —

Mi kredas — kaj vi devas ĝin kredi, sinjoro,
Mia patro! vi kredas? vere?

VOJEVODO.

Parigisto!

ZBIGNJEV.

Ho! mia patro!

VOJEVODO.

Kial vi la pasiulon

Incitas — staras tie ĉi, ekzekutisto?

Kial vi al ŝi kredas? Jen horo de honto!

Vi min, sinjoro, puŝus en frenezulejon?

Kaj tamen miaj sentoj estas tute sanaj!

Sinjur' Ĥmara! ordonu teruran alkovon

Revizii — ne estas fenestroj — forkuri

Li ne povos, kozak' lin eltrenos per haroj;

Vi suĉos liajn vundojn, kisos lian buŝon,

Kaj kuŝiĝos sur lia brusto, la malplena,

Ĉar mi el lia brusto la koron elŝiros. —

Vi povos poste dormi ĉe lia kadavro —

Se ne volos — mi kiel hundinon alligos.

Mi terure instruos malfidel-edzinojn!

Ili tion memoros ĝis fino de l' mondo!

Vi — estos fama inter la malĉastulinoj,

Mi — timigil' por idoj. — He, levu kurtenon!

(La homoj alvokitaj de Ĥmara volas iri en la alkovon. — Zbignjev star-
iĝas ĉe la enirejo kaj eltiras la sabron.)

ZBIGNJEV.

Patro, ili reniru, ĉar renkontos morton —

Mi ilin ne enlasos!

(Vojevodo mem faras paŝon antaŭen. Zbignjev eltiras pistolon kaj
almetas ĝin al sia brusto.)

VOJEVODO.

Li kun mi komencas?

ZBIGNJEV.

Haltu! sur sojl' vi paŝos en sangon de l' filo.

VOJEVODO.

Jen obstina diablo!

AMELJA.

Zbignjev, Zbignjev! levu
Kurtenojn — via patro ne scias kompreni
Mian suferon — do lin konvinku okuloj,
Per kiuj li nur sentas, ne havante koron;
Se li ĝin havus, — sentus kompaton milfoje.

(Al Vojevodo.)

Sinjoro! mi senkulpa estas, senmakula.
Rigardu, vi turmentas koron de virino! —
Zbignjev en buŝon metas ŝargitan pistolon —
Li ne povas toleri mian kor-turmenton?
Li mem-mortiĝos, edzo!

VOJEVODO.

Ĉu vi scias, kial
Li en buŝon pistolon metis, morti volis?
Ĉar li tie brueton de homo ekaŭdis.
Mi ĝin aŭdis ĉi tie.

AMELJA.

Maljunul' kruela!
Zbignjev! vi ja nenion aŭdis? — li mensogas.

ZBIGNJEV (kvazaŭ luktante kun si mem kaj frenezigante).

Ne, mi nenion aŭdis — ne — afer' finita.
Neniu tien iros. — Krista brusto, sanga
Per sep vundoj! — Neniu eniros — ho Dio!

(Iras al Amelja.)

Patrin'! — duonpatrino —

(Reniras kun abomeno kaj revenas antaŭ la alkovon.)

Patro' — mi kuŝiĝos
Kiel hundo — neniu eniros. Kompatu!
Patro! — Mi svenos, al mi fariĝas mallume —
Mi svenos duafoje! — La scen' min turmentas!
Patro! La filo ĵuras je l' anim' senmorta :

Neniu tie estas — tio ne sufiĉas?
 Ho patro! mi pereos kiel mia frato,
 Kiun vi antaŭ jaroj mortigis senvole —
 Rigardu — mi paliĝis, tremas, malfortiĝas —
 Kaj post unu momento krevos mia koro —

AMELJA (al Vojevodo).

Sinjur'! kompatu — via obstino moliĝu —
 Mi suferas terure!

VOJEVODO (malscrene).

Mi volus vin kredi.

(Deprenas el muro la krucifikson.)

Ĵuru je l' krucifikso!

ZBIGNJEV.

Mi ĵuros anstataŭ.

Ho patro! vi ordonas ĵuri al virino?
 Mi mem, je l' viv' anima mia, la eterna,
 Sur tiun krucifikson metinte la manojn,
 Ĵuras! — Buŝo virina, kiel buŝ' infana,
 Restu nemakulita per vortoj teruraj —
 Patro! donu la krucon — homojn oni povas
 Jam forigi. —

(Flanke.)

Jen kio! ŝi alproksimiĝas? —

AMELJA.

Mi ĵuros.

ZBIGNJEV.

Vi?

AMELJA.

Do kio?

ZBIGNJEV (mallaŭte en orelon de Amelja).

Patrin' — for de l' kruco!

AMELJA (metas manon sur krucifikson).

Je Kristaj vundoj, je la anim' de patrino,
 Je suferitaj de mi nun krucaj turmentoj,

Mi ĵuras, ke senkulpe estis suspektita.
Tiel vin Di' pardonu! —

ZBIGNJEV.

Afero finita.

VOJEVODO.

Ha?

ZBIGNJEV.

Ŝi ĵuris ja?

VOJEVODO.

Amen.

ZBIGNJEV.

Patr', ni iru kune —

Mi estas — kiel dorma!

VOJEVODO.

Ĥmara! mi ordonas,

Ke konstruestro al mi sendu masonistojn.

(Ĥmara foriras.)

ZBIGNJEV.

Kio estas?

VOJEVODO.

La reĝo deziras ĉi tie

Havi flanke kapelon; venos masonistoj!

ZBIGNJEV.

Patro? viaj okuloj rigardas terure!

VOJEVODO.

Mi? — estas ja trankvila. — Je vundoj de Kristo,

Mi, maljunul' kvieta, povus nun ekdanci,

Tiel mi ĝojas, tiel min gajigas ĵuroj! —

Se la morto-skeleto ne tiel rapidus,

Jam ne starus ĉe l' kapo, mi ridus plengorĝe —

Sed, sinjoro, formortis jam en mi la koro.

Morto tuŝos, kaj ostoj disfalos en polvon —

Pst! — silentu — vi aŭdis? ies botoj knaras —

Kial vi tremas?

ZBIGNJEV.

Estas malfrue, mateno —

(Eniras masonistoj kaj ĥmara.)

VOJEVODO.

Murfermu la alkovon — ne tuŝu kurtenojn.

ZBIGNJEV.

Patro tia malkredo —

VOJEVODO.

Vi mian edzinon

Kredu — ŝi krucoĵuris, do mi malpermesas

Al vi, sinjor', suspekti ŝin pri falsa ĵuro.

Plenmasoni! Mi ĵuras je l' infer'-potenco,

Ke neniam la homoj tien enrigardos!

Tie kuŝas mistero, — por hipokriteco

Fermita estas nigra, turmentanta puno!

Fantomo tie luktas kun mallum', malsato;

Letargiul' konsumas sian propran karnon —

Kun vitr-okuloj, buŝo sekiĝinta, sanga,

Li mordas manojn! — Jen la muro supren kreskas!

Rigardu la virinon kun koro el ŝtono,

Edzinon, kiu zorgas je virin'-honoro!

Mortigistin' fariĝis el malĉastulino!

Filo! kion vi diros pri duonpatrino?

(Dum ĉi tiuj vortoj la masonistoj plenmasonis parton de l' enirejo.
Amelja, kiu staris meditante, jetiĝas subite al piedoj de vojevodo.)

AMELJA.

Sinjoro! edzo mia —

VOJEVODO.

Ordonu.

AMELJA.

Mi petas,

Antaŭ ol vi murfermos la alkovon

VOJEVODO.

A! ha!

MAZEPA

AMELJA.

Mi devas tien iri.

VOJEVODO.

Vi jam ŝanceliĝas?

Kaj vi ĵuris!

AMELJA.

Mi devas eniri antaŭe.

VOJEVODO.

Se Dio vin kunigos — homoj ne disigos —
La mur' vin eble fermos.

ZBIGNJEV (flanke).

Vera tag' de l' juĝo!

AMELJA (montrante la alkovon).

Tie estas. —

VOJEVODO.

Ha! — estas? kiu?

AMELJA.

Estas viva —

ZBIGNJEV (flanke.)

Reĝo?

AMELJA.

Portret' de mia mortinta patrino!

VOJEVODO.

Je sep vundoj de Kristo! Tre lerta preteksto!
For de genuoj! — Tie laboru rapide!
Ni disiĝos — vi tiun oran edzo-ringon,
Adultulin', reprenos en konsistorio!
Nun, sinjorin', vi kvazaŭ dronos en la maro —
Ŝlosite, vi jam edzon ne senhonorigos.

ĤMARA.

Sinjoro, mur' finita.

VOJEVODO.

Fermita la tombo.

Sur muro pentru krucon. —

ZBIGNJEV (trovas dismetitan ventumilon, sur kiu Mazepa estis skribinta pri sia alveno. — Li legas kaj kaŝas la ventumilon).

Di'! — Kion mi vidas!

VOJEVODO.

Foriru, sinjorino, ĉi larmojn mi ridas ;
For, ĉiuj — tie estos reĝa preĝejeto.
Kaj post altar' — terura, kadavra sekreto,
Inter vi, malfidela, kaj infer' — kaŝita.
Mur' terura, dolora muro masonita!

(Al Ĥmara.)

Kaj vi — kiuj proksime estis de la muro,
« Requiescat »! — silentu pri ĝia teruro!
Nun for!

(Ĉiuj eliras. La vojevodo, kiel lasta, eltiras je mano la edzinon duone svenintan.)

AKTO KVARA

SCENO I

Malluma ĉambro — unu fenestro kun kradoj.

AMELJA sola, poste HĜMARA.

AMELJA.

Plej terura mizero — esti forgesita. —
Ho! kiel malserene brilas lun-radioj!
Jam dua nokto pasis — mi ne dormis horon.
HĜMARA (enirante kun kruĉo da akvo kaj kun pano).
Ĉu sinjorino mangos?

AMELJA.

Ne.

HĜMARA.

Estrino ploris?

AMELJA.

Ne. — Ĉu neniu pri mi vin demandis, HĜmara,
Kiel mi fartas?

HĜMARA.

Ne.

AMELJA.

Kaj neniu klopodas,
Nek propetas? — Ĉu estas mia edzo sana?
Diru, ke mi de l' plumba tegment' malvarmiĝas —
Havas febron!

ĤMARA.

Ĉu sendi al vi kuraciston?

AMELJA.

Ne! ankoraŭ ne estas mi morte-malsana,
Nur froste-tremas. Pastro ĉu al mi ne venos
Konfespreni?

ĤMARA.

Hodiaŭ sinjor' tre koleris
Kontraŭ filo, kaj ili tut-horon disputis.

AMELJA.

Ah!

ĤMARA.

Sinjorid' protektis pastron kapucenon,
Sed malfacile estis konvinki sinjoron;
En fino li permesis. Jen pano kaj akvo,
Plifortiĝu, estrino — ĉio reboniĝos.
Al sinjor' memorigis vin hodiaŭ cignoj,
Ili naĝis pro nutro ĝis sub la fenestron —
Sinjoro, por forpeli —

AMELJA.

Miaj karaj cignoj!

ĤMARA.

Por timigi, jam celis ilin per pafilo,
Sed Zbignjev la paftubojn per mano ekbatis,
Kaj ŝargo flanken-flugis. Sinjor' jam sopiras;
Hieraŭ ĉe la tablo li prenis kalikon,
Sed ne eltrinkis — plore ekmuĝis, jam volis
Malfermi la alkovon. — Lian frunton io
Premas kaj suferigas — pro si mem li hontas —
Li per kastelruinoj pli frue kovriĝos,
Ol li konfesos penton — fiera sinjoro!
Mi lin konas; li tia naskiĝis kaj mortos.
Mi scias, li sentema estas pri honoro.

MAZEPA

AMELJA.

Moŝto Ĥmara, ĉar via vorto multe povas,
Do petu la sinjoron edzon kaj insistu,
Ke alkovon rigardu li.

ĤMARA.

Ne pasos tiel

La tuta jaro; — tiu sekret' malkovriĝos —
Nun — ne eble.

AMELJA.

Pro kio?

ĤMARA.

Nun estas kapelo

Anstataŭ via ĉambro, — altar' ĉe alkovo.
Reĝo kun breviero ĉiam sidas tie —
En fervor' religia li venigis pastrojn,
Unianojn.

AMELJA.

Vi, Ĥmara, kun kelko da viroj
Iru nokte — detruu muron! Konvinkiĝos
Sinjor', ke mi senkulpa — fidela edzino.
Al sinjor' vi per tio faros grandan servon.

ĤMARA.

Sed, estrin', tie homo estas — en en la niĉon
Mi rigardis — li staris pala —

AMELJA.

Dipatrino!

Ĉu estas ia sorĉo? Sankta Virgulino!
Ĉu malbona spirito montriĝis al homoj?
Ĥmara! vi de l' satano vidis la pupilojn,
Brilantajn en mallumo super mia lito —
Iru for! — vi mensogas!

(Ĥmara eliras.)

SCENO II

AMELJA (sola).

Ho! se per tranĉilo
 Mi povus min traigi, trankvile ekdormi!
 Ne, ne — mi ne kuraĝas — devas estingiĝi
 Malrapide, kalikon maldolĉan eltrinki.
 Jen, aŭdiĝas mistera paŝo sur ŝtuparo?
 Iu venas — la pastro?

SCENO III

AMELJA, ZBIGNJEV en monaĥa vesto, eniras kovrita per kapuĉo.

AMELJA (kurante al li).

Angelo el nuboj!
 Zbignjev! de viaj paŝoj bruon mi rekonis!
 Jen vi!

ZBIGNJEV.

For! for! — ne tuŝu min!

AMELJA.

Kion mi aŭdas?
 Sekve iu alia.

ZBIGNJEV (malkovras la vizaĝon).

Jen mi!

AMELJA.

Kiel ombron
 Koler' balancas vian fleksiĝan figuron.
 Do kun kio vi venis al mi?

ZBIGNJEV.

Kun kondamno.

AMELJA.

Por kio vi kondamni min volas? Vi tremas!

ZBIGNJEV.

Mi venis vin kondamni antaŭ ol mi mortos,
 Kaj malbeni — kaj antaŭ vi kadavre fali
 Kun malben'.

AMELJA.

Kial vi min, mizeran, teruras!
 Kial vi min malbeni volas? Vi, la sola,
 Ne rajtas.

ZBIGNJEV.

Ho! ĉi tie estis la edeno —
 Viaj okuloj por mi — de la savo steloj,
 Viaj sopiroj estis himno de anĝeloj,
 Via anim' — duono de animo mia;
 Mi silentis, dum estis vi blanka, lilia;
 Nun por vi, nigra, vortoj ne estos makuloj.
 Konfesi amon? — al la mensogaj okuloj?
 Via koro — malpura; la buŝo, tremante,
 Ŝajnas sur min respiri jen tiel ardante,
 Ke mia frunto brulas kaj velkas. — Patrino!
 Ne proksimiĝu! — Venis mi rigardi vian
 Bel-vizaĝon, kaj moki la homan belecon —
 Ne kuraĝu eltiri de mi ian ĵuron,
 Ĉar mi ne povus ĵuri plu, ke vi ne falsa,
 Kvankam vi min instruis kiel false-ĵuri!
 Nun mi vin reciproke instruos pri io —
 Venu — mi en orelon diros — korvonigrajn
 Harojn tranĉu, pendiĝu — aŭ — vizaĝon vian
 Harkovru, ĉar ne hontas vi.

AMELJA.

Zbignjev!

ZBIGNJEV.

Per larmoj
 Vi min jam foje trompis — ŝparu vian naŭzon —
 Ho! — Kiel ĉi-virinon mi amis! — Kompaton!
 Ho! Kiel ĉi-virinon mi amis!!!

AMELJA.

Ho Zbignjev!

ZBIGNJEV.

Ŝajnis, ke ŝi ne konas volupto-dezirojn.
 Mi mem, malsaĝa pensis. — Sed nun, mi memoras,
 Kian ŝi — iafoje — maldecan kareson, —
 Kian varmegan buŝon — sur frunt' al mi metis!
 Mi tremas, ĝin pensante — kaj tiun vidaĵon
 Ne povas mi forpeli el memor' — ne povas!
 Ŝi mokis min en koro! Venu, mi avertos :
 Vi neniam en virtan homon enamiĝu,
 Ĉar estas amo longa, stulta, — al vivantoj
 Nekonvena — kaj fine fariĝas ridinda.

AMELJA.

Kiel mi por li preĝis hodiaŭ matene!

ZBIGNJEV.

Vi?

AMELJA.

Ĉu vi scias, Zbignjev, kion vi nun diris?

ZBIGNJEV.

Ĉu vi lin tre ekamis?

AMELJA.

Kiun?

ZBIGNJEV.

Ho! infera

Flam'! — ŝi demandas — kiun? vi scias — amaton!
 Malnoblan! — timulaĉon tiun! — murfermitan!
 Diru, ĉu tre vi amas? diru! ĉar mi ĵuras,
 Ke mia mano viajn manetojn disrompos —
 Se vi ne diros! tial konfesu, senplore —
 Vi kredeble tre amas tiun murfermiton,
 Ĉar vi pensas, ke vivon li por vi oferis?
 Mensogo! Timulaĉo, li svenis! — Pro Dio!
 Li — timulaĉo! Time svenis la rampaĵo —

Sed kiam li vekigis, tiam vin malbenas —
 Ŝiras bruston, malbenas, la bruston sangigas
 Kaj volus sian sangon ĵeti en okulojn
 Al vi — kie briletas larmoj sur lazuro —
 Li vin malbenas, manojn sangigas je muro;
 Pro malsato al buŝo ilin metas, sangon
 Trinkante, li nur vivas nun per la malbenoj!

(Li enpensigas.)

Ŝi lin eterne amos, lin mortintan homon —
 Kiel do el memoro elŝiri fantomon?
 Venĝo kiel skorpio, jen sin mem venenas!

(Dolore kaj plende.)

Amelja! ho Amelja! — venu! mi envias
 Tiun homon; envio granda min turmentas!
 Ho Amelja! — mi ĝemis, kiel li nun ĝemas,
 Kiel li, jen dolore mi mordis la manojn;
 Kaj mi envios lian trankvilon en tombo!
 Nun mi envias lian turmenton, malsaton —
 Donu tranĉilon — tiu kor' volas malvarmon.
 Vi vidos, kiel scias mi — ami, suferi
 Kaj morti. — La tranĉilon donu, mi konvinkos
 Vin, ke amate estus mi inda de l' amo,
 Eĉ de l' eterna!

AMELJA.

Haltu! tranĉil' tro malvarma,
 Do ĝin varmigis mia koro disŝirita!
 Ho! kiel li terure rigardas! — Ho Zbignjev!
 Vi certigis, ke iu homo estis tie?

ZBIGNJEV (ĵetas al ŝi la ventumilon).

Jen!

AMELJA.

Ventumil' de mia patrin'.

ZBIGNJEV.

Legu! Signoj,
 Laŭ ili mi certigis, ke estis —

AMELJA.

Ho Kristo!

Konduku min al reĝo, mi faros konfeson,
 Konduku — mi senkulpa — sed jen mortas homo!
 Ho! alian ekvidos vi min antaŭ reĝo —
 Ho! tie mi konvinkos vin kaj la aliajn —
 Mi ĉion diros, kion mi scias — kaj mortos,
 Tiam eble vi fine moliĝos komplete.

SCENO IV

LA SAMAJ. VOJEVODO.

VOJEVODO.

Sinjorin', antaŭ reĝo vi devas aperi —
 Afero malkovriĝis!

(Eltiras malantaŭ si la edzinon.)

ZBIGNJEV.

Defendi! senkulpa!

(Dejetas la pastran veston kaj eliras.)

SCENO V

Ĉambro, kiel en akto tria, transformita en kapelon. REĜO staras sur la ŝtupoj de l' altaro. — Kelke da Pastroj. Poste VOJEVODO, AMELJA, poste ZBIGNJEV.

REĜO.

Sanktaj patroj, jen kvazaŭ popola fabelo :
 Muroj ĝemas — fantomojn oni povus kredi —
 Maljuna vojevodo tro multe turniĝas,
 La edzin' malaperis — ĉu tie fermita?
 (Vojevodo eniras kun Amelja.)

VOJEVODO.

Jen, reĝ', edzino mia post la reviviĝo.

MAZEPA

REĜO.

Sed tie ĝem' aŭdiĝis, traiganta ostojn.
Vojevodo, sed kie estas via filo?

VOJEVODO.

Mi ne scias.

(Eniras Zbignjev.)

Jen, Dio sendis mian filon.

REĜO.

Mirinde! Sanktaj patroj, jen ensorĉigita
Lando! — la alvokitaj spiritoj aperas!
La mur' strangan aferon kaŝas, vojevodo,
Do ni ordonas tiun muron tuj detru!

VOJEVODO.

Forbruligi kastelon mi preferus, reĝo,
Ol rigardi post tiun muron, sed laŭ volo —
Sinjor' Ĥmara, disbati muron! — Sinjor' Ĥmara,
Alvoku homojn, ili venu kun marteloj!
Sed, via reĝa moŝto, la ora trezoro
Mia estos — la tuta trezoro belega,
Ĉar la trezoron mia edzin' enterigis.

REĜO.

Disrompi muron!

(La homoj forrompas la muron, unu el pastroj eniras en la alkovon.)

Kio?

PASTRO.

Kuŝas vir' sensente.

REĜO.

Elportu lin —

VOJEVODO.

Sed — reĝo, li estas la mia!

SCENO VI

LA SAMAJ. MAZEPA, elkondukita de pastro el alkovo.

REĜO.

Kio estas? jen mia paĝio — Mazepa!

VOJEVODO.

Al mi Fortuno blinda donacis jen vian
Paĝi'-kadavron, reĝo.

REĜO.

Veku lin per vino.
Pro Dio! — Vojevodo! vi kun via filo
Respondos antaŭ juĝo kaj la tribunaloj!

VOJEVODO.

Do estas, reĝa moŝto, paŝo tro kuraĝa
Mortigi adultulon?

REĜO.

La afer' klariĝos —
Gastama ŝajnas esti via dom', sinjoro!
Sinjor' Mazepa — kio do al vi okazis?

MAZEPA.

Reĝo, mi el sub tiu altaro eliras
Kiel Lazar' — aferon tutan mi malkovros,
Almenaŭ mi honoron de l' virin' defendos,
Kiu senkulpe edzan suspekton suferas.
Poste mi deve tiujn petos pri pardono,
Antaŭ aliaj, deve, mi svingos la sabron. —
Kun ordonoj sendite, de vi, mia reĝo,
Kaj kaŝinte leterojn sur brusto, mi devis
Ĉi tie fini ian honoran aferon —
En la duelo, dank' al okaz' evidenta,
Kontraŭulo per sabro malfermis leterojn;
Malfermitajn, paĝie sciema —

Mazepa!

Leteroj estis tiaj, ke mi blind-rapide
 Revenis en kastelon. — Por eviti reĝon,
 Mi eniĝis ĝardenon, ne renkontis gardon,
 Kaj longe pripensante dum tiu vespero,
 Kies protekton peti en mia mizero —
 Ĉar al mi tre severa minacis aresto —
 Mi eniris, laŭ mia destin' malfeliĉa,
 Ĉambron de l' sinjorino, malplenan. — Mi aŭdas,
 Iu venas — personoj du — sur ventumilo
 De l' sinjorin' mi skribas, ke mi estas tie;
 Poste mi time kuras en tiun alkovon,
 Kaj mallevas kurtenojn. — Jen la kulpo mia!
 Venis sinjoro Zbignjev kaj vojevodino.
 Mi volis jam la kapon elmeti, montriĝi,
 Jen enkuras kun homoj vojevod' armita,
 Krias, malbenas — kaj min post kurten' flarsentas;
 Mi volis jam eliri kaj per mia sabro
 Al mi vojon kozake malfermi kaj pordon —
 Sed mi aŭdas — ŝi ploras, ho reĝo, sinjoro!
 Ŝi, dum la edzo krias, piedbatas teron,
 Ŝi, je la sankta kruco de Krist' al li ĵuras,
 Ke mi forestas! Kiel mi povis eliri?
 Ŝi juris — mi ektremis, mia koro batis.
 Mi jam pensis, ke pasis la tuta ventego,
 Tiam la vojevodo vokis masonistojn.
 Ili venis — mi aŭdas — la haroj hirtiĝas,
 Oni per ŝtonoj fermos min en la alkovo!
 Oni ĵetas ŝtonegojn — alĝustigas ilin —
 Reĝo, kiel mi povis eliri? — ŝi juris!
 Neniu poste kredus al tiu virino —
 Mi ne eliris. — Tamen mia brust' ektremis,
 Kiam mi aŭdis, ke la muro jam leviĝas. —

Enmurigita. — Sentis mi subter'-mallaŭton —
 En okuloj aperis bildoj de juneco.
 Mi etendis la manojn, eksentis la ŝtonojn
 Malvarmajn, nemoveblajn — komencis bedaŭri,
 Ke mi lasis min tiel mizere murfermi —
 Mi ektimis. — Malsato estis pens' unua,
 Ĉie — mallumo; ĉio tuŝita — nur ŝtonoj.
 Ekregis min timego, timego senfina.
 Kiom da tiuj horoj sensunaj forpasis,
 Mi ne scias, jam preta por ĉiaj doloroj —
 Subite — io super mi — ĝemas, bruetas —
 Mi serĉas, per tremanta mano tuŝas murojn,
 Kaj trovis — kanario estis murfermita
 Kaj malsate-mortanta! — La birdetaj plendoj,
 La flugilet'-batado — de l' agonianta.
 Tiel min ekteruris, ke sen sent' mi falis.

REĜO.

Kaj vi estus mortinta kiel muŝ' en potoj,
 Se mi ne estus. — Kion pensas vojevodo?
 Ni ne vidas, ke tio ĉi difektus vian
 Honoron, ĉar ĉi tiu ventkapulo ree
 Viviĝis.

VOJEVODO.

Kio?

REĜO.

Tio pro erar' okazis.

Paĝi' verdiras, montri povus mi leterojn;
 Vi vidus, ke honestan li havis intencon,
 Volis savi honoron de via edzino.

VOJEVODO.

Pro Dio! — Sekve tute mi ne devas plendi,
 Sed kontentiĝi — resti kun la malhonoro
 Eterne?

REĜO.

Malhonoron mi tie ne vidas.

VOJEVODO.

Gentile, reĝo! pruvo de via favoro —
 Malhonoron ne vidas vi? Mi lup-kaptilon
 Metis kaj mi paseron kaptis kaj fringelon;
 Mi volis ĉambron fermi kaj mi — adultulon
 Enmasonis. — Malgaja okazo, sinjoro!
 Kaj nun al mi fariĝu jam laŭ volo dia;
 Sed paĝion mi havas kaj lin ne ellasos!

REĜO.

Vi kuraĝas?

VOJEVODO.

Se cervo en mian arbaron
 Eniras, cervo estas mia — mi lin pafis.
 Jen mi vin per malnova turmento gajigas.
 Ridu! — edzino! ridu, vi ankoraŭ vivas.

REĜO.

En maljunulo kiel terura venĝemo!

MAZEPA.

Mi min pro l' sinjorino intermetas, kiu
 Ĉi tie nek defendon trovas, nek kompaton.
 Kion ŝi, al ofendoj fordonite, faros?
 Do mi la reĝan moŝton petegas, jeĵuras,
 Ke li al mia vorto aldonu gravecon
 Per la reĝa aprobo. Jen la sabro nuda,
 Sur glavo la honoro de virin' ripozas:
 Do kiu ŝin insulti kuraĝas, al sabro!
 Dio nin juĝu!

REĜO.

Ni kun bedaŭro permesas.

VOJEVODO (eltiras la sabron).

Al duel'!

REĜO.

Maljunulo, vi mem?

VOJEVODO.

Jen mi estos
Rival' de fiamanto, kiu ŝin, malĉastan,
Defendas. — Dio estus tute senkompata,
Se mi lin ne mortigus.

ZBIGNJEV.

Patro, mi duelos
Por vi! se mi pereos, tiam vi almenaŭ
Kredu ŝian senkulpon. — Ŝi vivu trankvile,
Ĉar Dio mem defendis ŝin de kalumnio
Per homa sango — Dio trafas — vi promesas?

AMELJA (al Vojevodo).

Ho, ne permesu tion — li volas pere!

VOJEVODO.

For! li venkos — kaj vi!

(Forpuŝas ŝin.)

Nu, filo, al la sabro!
Zbignjev! — jen al mi flustras nun kvazaŭ diabloj,
Ke vi venĝos por patro. Ĉu vi tion sentas?
Se ne, restu.

ZBIGNJEV.

Mi tute ne pensas pri tombo!
Tio estas tro frue. Nu, sinjor' Mazepa,
Pro kio ni nin haki devas, eble blinde
Ĉe luno, aŭ ĉe l' brilo de torĉoj flagrantaj?
Mi proponas pistolojn — en la arbareto
Mi atendos.

MAZEPA.

Ni iru!

ZBIGNJEV.

Ha! — Moŝto sinjora!
Antaŭ kiam fariĝos al ni volo dia,
Por vi, la kavaliro, honordefendanta,
Indas, ke vi humile al estrin' kliniĝu,
Kaj ŝi vin kaj defendan batalilon benu.

MAZEPA

VOJEVODO.

Ŝi — paĝion?

ZBIGNJEV.

Se kulpa ŝi estas, lin sendos
Kun beno de pereo — Dio kulpon punas.
(Mazepa genuas antaŭ Amelja, kiu staras senmove.)

VOJEVODO (al Amelja).

Aŭskultu, sinjorino! via ben' mortigas —
Benu lin! — Vi, malviva kiel ŝton', — la manon!

AMELJA (elŝirante la manon).

Kial vi min premeĝas!

(Benante Mazepan.)

Je l' turment' de Kristo,
Estu benata. — Kaj la alia? la dua?...

VOJEVODO.

Tiun benis la patro. — Hej! servistoj, iru
En arbaron kun torĉoj! lumigi al filo.

ZBIGNJEV.

Ne, neniu min sekvu.

VOJEVODO (al Zbignjev).

Mortigu! — timego

Min traigas. — Mortigu! celu en la koron!

(Zbignjev kisas la manon de l' patro kaj donas signon al Mazepa. Ambaŭ eliras.)

SCENO VII

LA SAMAJ krom ZBIGNJEV kaj MAZEPA.

REĜO (al Vojevodo).

Moŝto, vi konsterniĝis — kaj rigardas teren.
Estas tempo revoki la furiozulojn.

VOJEVODO.

Jam pasis temp' — ofendo postulas la tombon.
Ne estas tempo! — Tie falos ja kulpulo!

Kaj mia fil' — jen frunto mia ne paliĝas —
 Mia filo honoron mian ne ofendis.
 Grandan maljuston farus ja Sinjoro-Dio,
 Se mia fil' ne venus reen — Ho, silentu —
 Tut-silentu...

(Momento da silentado, aŭdiĝas pistola pafo.)

PASTRO.

Jen dia juĝo...

VOJEVODO.

Jes, mi aŭdas.

Mia fil' pafis — dua ne pafas. Ne pafos —
 Jam lia frunt' de morto terure blankiĝas —
 Krevis kor', — ĉe piedoj li kuŝas de l' filo.
 Estu laŭdata, Dio! — Jen via dispono.
 Vin, Sankta Virgulino! gloras mia koro! —
 Tiel longe la filo restas ĉe l' kadavro —
 Strange — pafis nur unu, pafis mia filo, —
 Kaj poste jam forpasis pli ol unu horo —
 Kadavro jam rigida. — Mi ne vidas filon.

SCENO VIII

LA SAMAJ, MAZEPA eniras kun pistolo en mano kaj stariĝas ĉe la reĝo.

VOJEVODO.

Kie estas la filo? mia filo? Kial
 Vi paliĝis? — En nomo de l' Sankta Virgino!
 Kio estas? — La bruston montru!

(Kuras al Mazepa kaj disŝiras al li malsupran veston (ĵupanon), sur la brusto.)

Ne vundita!!!

Mia fil' mortigita! — Filo mortigita!!!

(Falas vizaĝe ĉe la piedoj de la reĝo.)

REĜO.

Ne tuŝu lin — silentu — ĉar ĉi tiaj vundoj
 Devas sin mem sanigi — havas proprajn larmojn.

VOJEVODO (leviĝtante).

Mian idon! mi volas vidi mian idon!

(Eliras.)

REĜO.

Sekvu lin —

(Unu el pastroj eliras post la vojevodo.)

SCENO IX

LA SAMAJ, krom VOJEVODO.

REĜO (al Mazepa).

Ĉu okazis ĉio laŭ honoro?

MAZEPA.

Ne demandu, ho reĝo! li estis modelo
 De nobleco kaj ĉarmo — mortis tre malĝoje.
 Zorgu pri ŝia sorto — jen ŝi, morte-pala,
 Statuo, kiun tenas rigidec' dolora...
 Anĝel' ŝian spiriton levas kaj karesas —
 Per malesper'-silento al li ŝi respondas.

REĜO.

Rigardu, jen revenas li, — fantomo pala —
 Maljunulo freneza — iras — ne haltigu!

SCENO X

LA SAMAJ, VOJEVODO revenas, tenante en mano tukon sange makulitan.

VOJEVODO.

Miaj larmoj kaj fila sango — jen sur tuko.

AMELJA (freneze proksimiĝas al li).

Por mi.

VOJEVODO (jetas al ŝi en vizaĝon la sangon tukan).

Jen, en okulojn!

AMELJA.

Ah! — Ah! —

(Svenas kaj falas dorse.)

REĜO.

Tag' de l' juĝo!

VOJEVODO.

Mi aranĝos nun, reĝo! pompan enterigon...
Mia invito reĝan bon-akcepton trovu!
Paĝio ankaŭ. — Riglojn antaŭ pordoj ŝovu! —
Paĝio ankaŭ. — Nigran flagon elpendigu —
Per vin' tokaja tinon en kelo plenigu —
Por mortfesten'.

REĜO (flanke).

Arestas li min sendemande.

VOJEVODO.

Pro ŝparem' — enterigi — ni volas pogrande.

AKTO KVINA

SCENO I

Salono en kastelo.

VOJEVODO, ĤMARA

VOJEVODO.

Ĉu filo jam en ĉerko?

ĤMARA.

Jam en ĉerk' ripozas.

VOJEVODO.

Ĉu edzino ankoraŭ ne mortis?

ĤMARA.

Ŝi vivas —

Sed jam nelonge daŭros.

VOJEVODO.

Nun, sinjoro Ĥmara,

Kio ajn nun al griza mia kap' okazos,

Sed vi min ne forlasos?

ĤMARA.

Mi ĵuras je l' kruco!

VOJEVODO.

Do vi vidis la reĝan armeon proksime?

ĤMARA.

Veturigante ĉerkon, mi ĝin kun kanonoj

Renkontis.

VOJEVODO.

En distanco?

ĤMARA.

De du mejloj.

VOJEVODO.

Bone!

Mi havas tempon. — Reĝo volas forveturi,
 Mi lin ellasos — tamen restos la paĝio
 Eterne, se eĉ falus mia kap'! — Nun iru!

(Ĥmara eliras.)

Ĝis nun ankoraŭ tute mi ne ploris, tiel
 Venĝo larmojn en miaj okuloj sekigis...
 Ĝi jam el miaj manoj iel ne forkuru!...

SCENO II

VOJEVODO, REĜO vojaĝe vestita, MAZEPa, kelke da reĝaj ĉambristoj.

REĜO.

Vojevodo! ĝi estus nia kordeziro,
 Plori super la tombo de via solfilo,
 Ĉar ja, ni ankaŭ bravan militiston perdis —
 Vere, malĝoje estas! Hieraŭ ĉi tie
 Li parolis, nun estas ie antaŭ Dio,
 Rigardas nin komplete kaj nomas la rozojn
 De nia mondo — dornoj. Afero — profunda,
 Kiam subite tia junulo foriras
 Kaj esperojn forportas en alian sferon.
 Strange, ke homo iam laŭte ridi povas,
 Estante en ĉi tia mondo — jen, destino!
 Amik' maljuna! kiam la vundoj saniĝos,
 Ni invitas vin gaste al ni, en ĉefurbon.
 Vere, estas malgaje lasi vian domon,
 Sed urĝantaj aferoj de la respubliko
 Min vokas.

VOJEVODO.

Enterigo ne estas farita,
Kaj reĝo forveturas?

REĜO.

Kredu, vojevodo,
Ke, se tio ne estus malutil' por regno —

VOJEVODO.

Kial vane paroli, via reĝa moŝto!
Vi veturas — sed restos mortigint' de l' filo.

REĜO.

Pro Dio! via moŝto, kial?

VOJEVODO.

Por raporto.

REĜO.

Jen kio? Vi juĝejon ĉi tie starigos?
Via moŝto, la reĝon vi iom atentu! —
Ĉu vi turmenton, sangon de homo postulas?
Pro Di'! — se vi ŝprucigos ĝin sur mian frunton,
Tiam ankaŭ kap' via al ĉerko ruliĝos.
Ĉu vi kuraĝus fari provon de ribelo? —
Ĉu vi volus aresti personon de l' reĝo?

VOJEVODO.

La reĝo forveturos — sed sen la paĝio.

REĜO.

Ni vidos, ĉu haltigi nin moŝto kuraĝos?
Vi ne kuraĝos.

VOJEVODO.

Forton uzos mi nenian,
Sed al vi, reĝa moŝto, tomboj baros vojon.

REĜO.

Al la sabroj, sinjoroj!

VOJEVODO.

Mian kovras ingo;
Gorgoĵn de pafilegoj mi ordonis ŝtopi.

Per fort' mi ne rezistos — nur en mia domo
 Netrapaŝeblan sojlon al vi mi kuŝigos.
 Sojl' por reĝa piedo —

REĜO.

Ha — rampaĵ' fieraj!

(Vojevodo eliras en la flankan ĉambron kaj revenas, portante sur ŝultroj la ĉerkon de l' filo, kiun li starigas laŭlarĝe en la pordo.)

VOJEVODO.

Jen estas, reĝa moŝto, ĉerk' de mia filo!
 Jen reĝa sojlo, sankta kadavro de homo!
 Nun, reĝa majesteco, la patro atendas...
 Piku per via reĝa sprono tiun korpon,
 Ke ĉian malhonoron konu mia domo —
 Donu paĝion, iru —

REĜO.

Forŝovu kadavron.

VOJEVODO.

Nun mi scias, ke bone mi fermis la ĉambron —
 Nu, sinjoro paĝio, vi restos? konsento?
 Unu tagon vi restos. Hodiaŭ merkredo?
 Vendrede mi promesas ellasi vin vivan,
 Sed mi havos vin vivan — almenaŭ dum horo —
 Je l' Dipatrin' mi ĵuras, ke vi restos viva,
 Mi volas vin nur havi en manoj...

MAZEPA (flanke).

Terura!

Li per manoj serpente involvi min volas.

VOJEVODO (al Reĝo).

Mi ĵuras, reĝo, ke mi lin ellasos vivan.

MAZEPA (al Reĝo flanke).

Lasu min — mem veturu, taĉmentoj — proksime.
 Vi revenos, kastelon kanonoj ĉirkaŭos —
 Nenio min minacas — Vi aŭtoritaton
 Perdus. — Mi antaŭsentas, ke havos kuraĝon,
 Vi revenos post horo...

REĜO (pripensinte, al Vojevodo).

Maljunul' obstina!

Mi lasas la paĝion — sed por unu haro
El li prenita — unu honor'-makuleto —
Vi respondos per kapo!

VOJEVODO.

En dolora domo

Paĝio fartos bone. —

REĜO.

Do ĝis la revido.

(Vojevodo prenas la ĉerkon sur la ŝultrojn. Rego kun ĉambristoj eliras.)

SCENO III

VOJEVODO, MAZEPA, poste ĤMARA kaj servistoj funebre vestitaj.

VOJEVODO.

Ĝis revido? — mi dubas — larĝa lit' kadavra,
Mi eble sekvos filon, — mort' postkuras homojn.
Rigardu! kiel homo portas Kristan krucon,
Li laciĝos kaj eble mem kadavre falos. —

(Li kuŝigas la ĉerkon en mezo de l' salono. Mazepa, fronte de la scenejo parolas al si mem. — Vojevodo staras apud la ĉerko kaj donas ordonojn.)

MAZEPA.

Do mi restis nun kiel reĝa garantio.
La maljunul' min kvazaŭ tute ne atentās,
Sed en li kolerego terura nun bolas,
Kaj li venĝon preparas —

VOJEVODO.

Hej! sinjoro Ĥmara!

(Eniras Ĥmara kaj servistoj.)

Starigu katafalkon — estos du kadavroj —

MAZEPA.

Malvarme al mi —

VOJEVODO.

Kaj la kandelogojn vice!

MAZEPA.

Mi preferus nun ian morton — fulmrapidan.

VOJEVODO.

Fiksu ankaŭ sur dua ĉerk' miajn blazonojn!

MAZEPA.

Ne por mi —

VOJEVODO (al Mazepa frapante lian ŝultron).

Moŝto!

MAZEPA.

Kion?

VOJEVODO.

En plafon'?

Vi kalkulas fendojn

MAZEPA.

Mi rigardas plafonon sencele...

VOJEVODO.

Malnova dom'!

MAZEPA.

Ĝi daŭros.

VOJEVODO.

Plue ol ni multaj.

MAZEPA.

Vivo estas en mano dia.

VOJEVODO.

Vi permesos,

Ke mi lasos vin solan; — en dom' sortbalita

Mi lasos vin kun filo.

(Montras la ĉerkon kaj al ĝi turnas parolon.)

Leviĝu, dormulo!

Leviĝu, distru! Kion? neniam? — neniam! —

Nur cindro kaj tabuloj?

MAZEPA (flanke).

Malfeliĉa!

VOJEVODO.

Restu

Kun ĉi enuiganto, kaj distru vin iel,
Ĝis mi revenos.

MAZEPA.

Al vi, sinjoro, mi havas

Unu peton...

VOJEVODO.

Nu? — eble vi nutras patrinon,
Malriĉan? — al ŝi donos mi premantan panon,
Kiam vi mortos.

MAZEPA.

Tion mi diru malkaŝe :

Via filo, — sinjoro, mortante...

VOJEVODO.

Daŭrigu...

MAZEPA.

Transdonis al mi lastajn petojn.

VOJEVODO.

Mi frenezu!

Testament'-plenumanto lin faris la filo!

MAZEPA.

Vi ne volas aŭskulti, sinjoro?

VOJEVODO.

Parolu.

MAZEPA.

Mi ĵuras antaŭ Dio, kaj morto proksima,
Ke mi havas honestajn intencojn. La filo
Disponis, ke parolu mi kun la patrino.

VOJEVODO.

Mi sendos ŝin al vi.

(Eliras.)

SCENO IV

MAZEPA, poste AMELJA.

MAZEPA.

Ho, Dio! kiel vundas
 Min liaj vortoj! — Vane mi devas suferi.
 Ankaŭ indus pretigi por morto animon,
 Kaj preĝi al Plejsankta Virgino ĉe l' ĉerko —
 Kaj tiam mian frunton mi portos fiere,
 Kaj helpon al mi donos Sankta Triunuo —
 (Eniras Amelja kun malligitaj haroj, blanke vestita.)
 Jen ŝi. — Kiel vi pala estas?

AMELJA (faras al li signon, ke li ne proksimiĝu).
 Mortiginto!

MAZEPA.

Permesu proksimiĝi — estrin' malfeliĉa!
 Ne forigu per mano — nin ligas la ĉeno
 De kor-sekreto, kiel tri fantomojn fratajn.
 Mi havas de l' mortinto la lastan disponon.
 Li vin amis, estrino! —

AMELJA.

Li!

MAZEPA.

Mem lia morto —
 (Amelja kun abomeno montras Mazepon.)
 Ne, estrin'! mian frunton sango ne makulas.
 Ne, mi lin ne mortigis.

(Amelja faras paŝon, proksimiĝante al li.)

Aŭskultu! Veninte

En betularon — mi lin vidis ĉe lunbrilo
 Tre malgajan kaj palan. — Via koro frapas?
 (Amelja faras signon per mano, ke li parolu plue.)
 Li unua sin ĵetis al mi ĉirkaŭprene
 Kaj metinte la kapon sur bruston tremantan,

Silentis longe — mian treman tenis manon.
 Ve! mi havis en mano ŝargitan pistolon! —
 Subite — paf' aŭdiĝas! Mi vidas — per manoj
 Li kaptas la aeron kaj sur dorson falas...
 Mi alkuras — rigardas : korala ŝnureto
 Fluante sur kiraso, makulis lekantojn.
 Li malfermis okulojn en ora lunbrilo,
 Kaj li diris : Pardonu! vi ŝian honoron
 Defendis, mi pereas de l' mano benita;
 Do pardonu vi ambaŭ kaj pri mi memoru!
 Kaj poste li komencis preĝi senkonscie,
 Kaj fermis larm'-okulojn —

(Amelja komencas plori.)

Pri vi parolante.

Ploru! ploru estrino! — ĉar li, la kuŝanta
 En ĉerko, estas inda de nia adoro. —
 Amelja! — jen mi via frato de doloro! —
 Se iam, mi, mizera orfo en kortego —
 Vi fratojn ja ne havas? Do, se mi mizera,
 Kortega bubo, povas doni al vi helpon?
 Jen mi sur la genuoj.

AMELJA (metas la manojn sur la kapon de l' genuanta paĝio kaj kliniĝas
 super li.)

Vin gardu anĝeloj

De l' sankta Dipatrino. — Mi estas mortanta.

SCENO V

LA SAMAJ, VOJEVODO.

VOJEVODO (kaptas la manon de Amelja kaj forĵetas ŝin de la paĝio).

Kio? ĉe la kadavro?!

AMELJA.

Ne puŝu min, moŝto!

Mi falos mem — venenon prenis —

(Ŝanceliĝante ŝi iras kaj ekgenuas apud la ĉerko.)

VOJEVODO.

Jen fiere!

Sed ne kuŝiĝu tie, sur ĉerko de l' filo,
Vi makulas...

MAZEPA.

Teruro! — Do lasu ŝin morti! —

VOJEVODO.

Nu? kadavro?

SCENO VI

LA SAMAJ, ĤMARA, poste Kuriero de l' reĝo.

ĤMARA.

Sendito reĝa...

VOJEVODO.

Morto-korvo

Enflugu — malvivaĵo estas preta, freŝa!

(La kuriero eniras.)

KURIERO.

Reĝa moŝt', renkontinte sian soldataron
Antaŭ kastel', ordonas malfermi pordegojn.
Korteganon li ankaŭ postulas.

VOJEVODO.

Nobelo —

Mi libera! — kastelon ne donos, li prenu! —
Koncerne al paĝio : reĝo povas fidi
Al vort' nobela, tiun mi ellasos vivan;
Sed reĝa moŝto estos bonega ĉasisto,
Se lin kaptos.

KURIERO.

Sinjoro, ni havas kanonojn.

VOJEVODO.

Ni aŭdos — vi foriru!

(La Kuriero kaj Ĥmara foriras.)

SCENO VII

VOJEVODO, MAZEPA kaj AMELJA, mortinta sur ĉerko.

VOJEVODO.

Ho, prapatroj miaj!
Ĝoju, ĝoju — mi lasta forlasas la mondon,
Ankaŭ noble.

MAZEPA (flanke).

Tremfrosto iras tra la ostoj...

VOJEVODO (proksimiĝante al la kadavro de Amelja).
Jen kio? sur la ĉerko! — ĉu adulta lito
Ĝi estas? Vi silentas? — Nu? mi vian bruston
Malfermos, vian timon vidos. — Nu, leviĝu!
Hipokrita, vi estis ĉiam tiel pura,
Nun vi ne timas per la cindro malpuriĝi —
Nu, leviĝu, for!

(Forjetas ŝin de la ĉerko.)

Kiel mi makulis manojn,
Tuŝinte tian aĵon — fi! la abomeno!

(Al Mazepe, kiu genuas apud la korpo de Amelja.)
Aŭskultu, pendigito ŝirinta la ŝnuron!
Ne tuŝu la edzinon...

MAZEPA (leviĝante).

Maljunul' rabia!
Mi bedaŭris, pensante, ke vi — malfeliĉa,
Nun mi vin malestimas!

VOJEVODO.

Vi diris prudente —
Atendu — ni babilos — mi sidos sur ĉerko —
Nu?

MAZEPA.

Vi estas malnobla. — Sed mi vin ne timas.

VOJEVODO.

Ha...

MAZEPA.

Mi povas la koron malnoblan — frakasi...
 Povas vin rigidigi kiel fulmobato.
 Stariĝu — ĉar kadavro sub vi abomenas!

VOJEVODO.

Kadavr' de l' filo!

MAZEPA.

Fila kadavr' turmentiĝas,
 Li ne volas vin senti — li ĝemas en ĉerko.
 Stariĝu, frunte falu, kadavr'-ofendanto,
 Ĉar mi estas ĉi tie anĝelo-venĝanto!
 Ĉar mi havas la fulmon, sed sentas kompaton,
 Kaj sur la grizan kapon ne ĵetas la baton!
 Sur la kapon mizeran...

VOJEVODO.

Jen vi estas stulta.

Vi parolas, — ĉirkaŭe kadavroj aŭskultas;
 Vi estas tria.

MAZEPA.

Mi min konfidis al Dio —
 Sed vi, falu al miaj piedoj! se diros
 Mi kruelan novaĵon — vi eble mort-falos —

VOJEVODO.

Diru —

MAZEPA.

Vi, for de l' ĉerko!

VOJEVODO.

Diru, aŭ la kapon..

MAZEPA.

Do vi trinku la galon de l' mordanta vorto :
 Jen — reciproke ambaŭ sin amis ĝis morto!

VOJEVODO (forsaltas de l' ĉerko).

Mensogo!

MAZEPA

MAZEPA.

Vi stariĝis?

VOJEVODO.

Sankta Dipatrino!

MAZEPA.

La fil' sin mem mortigis por via edzino!

VOJEVODO.

Mia fil' — rememoru mi! — Abomenuloj! —

(Aŭdiĝas muĝo de kanonoj; kelke da kugloj enflugas en la salonon.)

Foriru — tie flugas kugloj. — Senhontuloj!

For!

MAZEPA.

Mi venos kun reĝo! — Via fil' deziras

En tombo kuŝi apud — ŝi —

VOJEVODO.

For!

MAZEPA.

Mi foriras,

Kio ajn min atendas post foriro tia.

(Li eliras. Oni aŭdas, ke en la koridoro lin atakas homoj armitaj. —
Tintado de mallonga batalo.)

SCENO VIII

VOJEVODO (sola).

Ili kaptas lin — ligas. — Jen la venĝo mia!
 Ŝnur' karnon tranĉas — korpon ĉevalo ŝiradas —
 Malvarme al mi. — Filo! via patro vadas
 En sango, — ne timigu vin sanga fantomo...
 Kia mallumo? — Kiaj monstroj en la domo
 Sin laŭte kisas en la mallum' koridora?...
 Nu, leviĝu el ĉerko, mizer' senhonora!
 Diru, ke li mensogis — tabulojn disĵetu!
 Malfermiĝu, vi ĉerko! pri pardono petu!

Antaŭ mi falu! — Eble larmiĝos pupilo —
 Ĉerko! eble pardonos mi — la patr' — al filo,
 Se el vi fluos larmoj pro mia mizero! —
 For! kadavrojn satanoj pelu tra l' infero!
 Sufiĉe da trompado kaj vivo-dorloto!

SCENO IX

VOJEVODO, ĤMARA, poste REĜO fronte de armitoj.

ĤMARA.

Reĝo....

VOJEVODO.

Ponardon!

ĤMARA.

Estro! subiĝu —

VOJEVODO.

(Reĝo eniras.)

Al koto?

REĜO.

Vojevodo! vi donos kapon —

VOJEVODO (mortigas sin).

Jen — sentime!

Sed min de ĉi-kadavroj metu mal-pro-ksi-me.

(Falas senviva.)

FINO.

KLARIGOJ

Loko kaj tempo de agado. La aludo pri Gluhov, kuŝanta ne malproksime de la vojevoda kastelo (akto II, sceno x), montras, ke la dramo okazas en Ukraino en la jaro 1663, ĉar, laŭ historio, en tiu ĉi jaro la reĝo Jan Kazimir atakis tiun ĉi fortikaĵon.

Jan Kazimir, reĝo de Polujo de 1^a jaro 1648 ĝis 1668, kiam li abdikis por fini la vivon en franca monaĥejo; li naskiĝis en la jaro 1609, estis do en la jaro 1663 55-jaraĝa.

Tiu ĉi plej malfeliĉa el reĝoj de Polujo, lasta posteulo de Jagiello sur trono de la pola Respubliko, estas pentrita de 1^a poeto per tro malhelaj koloroj. Li estis bona armeestro kaj sufiĉe lerta diplomatiisto, kvankam homo ŝanĝiĝema, maltrankvila, religie netolerema kaj fama pro siaj amaĵoj. — Li militis kontraŭ la ribelantaj kozakoj, helpataj de tataroj, kontraŭ rusoj kaj svedoj, kiuj kune preskaŭ pereigis Polujon, kvazaŭ mirakle savitan.

Mazepa, Koldynski Jan, pola nobelo, verŝajne de princa rutena deveno, helmano de malantaŭ-dnjepraj kozakoj, estis eminenta persono, konata en historioj de Polujo, Rutenujo kaj Rusujo. La dato de lia naskiĝo ne estas konata, verŝajne la jaro 1644. Edukita ĉe la jezuitoj, li fariĝis paĝo de la reĝo Jan Kazimir, sed pro diversaj am-aventuroj li devis forlasi la kortegon.

Lokiĝinte en patra bieno en Volinio, li preskaŭ perdis la vivon pro nova am-aventuro, kiam lia najbaro Falbowski, vengante delogon de sia edzino, igis lin alligi nudan al ĉevala dorso, vizaĝe al vosto, kaj peligis la sovaĝan ĉevalon en stepojn. — Por kaŝi sian honton Mazepa forkuris en Ukrainon kaj de nun lia sorto ligiĝas kun la sorto de la kozaklando. — Fariĝinte helmano, li amikiĝis kun Petro la Granda, sed komencis komploti por liberiĝi de Moskvo kaj krei el la malantaŭdnjepra Ukraino sendependan regnon sub protekto de Polujo. Li sekrete ligiĝis kun la svedoj kaj subiĝis al Karlo XII^a, kiun venkis Petro la Granda apud Poltava. Tiam Mazepa sekvis Karlon XII^{an} en Turkujon, kaj li mortis tie en la jaro 1709 en Varnica apud Bender.

AKTO I

Paĝo 2, *Padua*, fama itala universitato, en kiu studis multaj poloj.

— 2, *rotmajstro* — taĉmentestro.

— 3, *marŝalo* — distriktestro.

— 3, *Lubomirski*, ribelulo ligiĝinta kun svedoj.

- Paĝo 3, *partiano de reĝino* — t. e de Maria Ludvika, edzino de Jan Kazimir.
- 3, *cauda geamika* — anoj, (caŭda = vosto).
- 3, *latinajon lasu flanke* — aludo pri la kutimo de deksepa centjaro en Polujo, enmiksi en la lingvon polan latinajn vortojn (t. n. makaronismo)
- 4, *accelerans* = rapidigante.
- 4, *secare inimos* = distranĉi malamikojn.
- 4, *fortunam* = havaĵon.
- 5, *muŝetoj*, — nigraj plastretoj gluataj sur vizaĝon, por ke la haŭtkoloro ŝajnu esti pli blanka.
- 7, *cerbero trikapa* — mitologia hundo gardanta la pordegon de l' inferos
- 8, *Kastelanino Robroncka el Spiĝo* — Spiĝ (germ. Zips, hung. Szepe) kuŝas sur la sudaj deklivoj de la Tatra montaro kaj apartenis tiam al Lubomirski. Robroncka — nomo ŝerce farita el « robe-ronde » (robo ronda).
- 13, *Mi havas defendanton* — Zbignjevon.
- 16, *nokta reĝino Diano* — diino de l' luno kaj de l' ĉaso.
- 16, *Ave Maria* — saluton al vi Maria, preĝo, kiun la reĝo senpense recitas.
- 17, *ekskardinalo*. Jan Kazimir, edukito de jezuitoj ĉe la kortego de sia patro, reĝo Zygmunt III^a Vaza, estis dum du jaroj novico en monaĥejo kaj ricevis de la papo Innocento X^a la kardinalan dignon.
- 17, *ventkapulo* — homo facilanima.
- 19, *ortodoksa* — verkreda. Tiun ĉi titolon Jan Kazimir ricevis de Aleksandro VII^a kiel rekompenco por la forpelo de la Ariana sekto el Polujo.
- 24, *Radziejowski* — subkanceliero, perfidulo, kiu, venĝante al reĝo Jan Kazimir pro delogo de sia edzino, enkondukis la svedojn en Polujon.
- 27, *franca arestejo* — kiam Jan K. kiel reĝido estis tenata en malliberejo en Tours-de-Bouc, kaj laŭ ordono de l' kardinalo Richelieu en la jaro 1638 sidis en ĉambro kradumita — tiam Klara Herbert (Klaudia), alivestite kiel kantistino, alportadis al li sciigojn el Polujo.
- 32, *plebejo* — nenobelo; Mazepa estis, laŭ la pola kronikisto Pasek, lia persona malamiko, nove nobeligita kozako, sed efektive li estis de deveno nobela.
- 33, *Gluĥov*, en gubernio Ĉernihova, malantaŭ Dnjepro, en la jaro 1664 sieĝata de Jan Kazimir.
- 33, *ĉevalo portos sur tronon*, — rilatas al la posta hetmaneco kaj la aspirojn de Mazepa.
- 38, *kontuŝ*, nobela supra vestaĵo kun distranĉitaj manikoj.
- 38, *maljuna francino*, — Maria Ludvika de Gonzaga, edzino de Jan Kazimir.

Paĝo 38, *victoria* = venko.

- 39, *Rakoĉi* — Georgio II de Transilvano, princo hungara, kiu ligiĝis kun Gustav Adolf kontraŭ Jan Kazimir.
- 39, *iometete...*, la analogie formita vorto de l'originalo montras bone la interbatalon de sciemo kun la sento de honto.
- 40, *Nur al ŝi mi konfesos infanan sciemon* — ĉar Zbignjev lin maestimumus pro la malrespekto de fremda letera sekreto. Amelja, kiel virino, pli volonte lin pardonos.
- 41, SCENO XII. La naiva senĝeneco de la konduto de Amelja rilate al Zbignjev, pruvas, ke ŝi estas ne konscia pri siaj sentoj. La sceneto antaŭanonceas alegorie krizon inter la reciprokaj rilatoj de Zbignjev kaj Amelja.

AKTO III

- 44, *silentu!...* Nur nun Amelja fariĝis konscia pri sia amo al Zbignjev, kiun antaŭe ŝi opiniis permesita sento de duonpatrino al duonfilo.
- 47, *Mi mem estas (kulpa)*. Terura malkompreno!, ĉar la vojevodo ne divenas la amon de Zbignjev al Amelja, sed certiĝas des pli, ke lia edzino estas kulpa, ĉar ŝi kaŝas Mazepon en la alkovo.
- 54, *portreto* (pole « konterfekt »), ĉu ne erare anstataŭ kanario (kanarek), pri kies morto poste rakontas Mazepe en la sekvanta akto.

AKTO IV

- 60, *edeno* — paradizo.
- 65, *Lazaro* — revivigita de Kristo.
- 69, *mi proponas pistolojn*, — Zbignjev ekintencas memmortiĝi.

Biblioteka Uniwersytecka KUL



1001144563